
# EL POPOLA ĈINIO

8
1977

中国报道





Intimaj kunbatalantoj — Prezidanto Maŭ,
Kamaradoj Ĝoŭ Enlaj kaj Ĝu De

EL POPOLA ĈINIO
中国报道

1977
N-ro 8
(227)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KOVRILO:

P. 1. Laborpaŭzo

P. 4. Ekzercado

KOREKTO

La bluaj desegnoj en la suba parto de la du supraj poŝtmarkoj kaj la tekstoj de la du subaj poŝtmarkoj sur la dorsa flanko de la kovrilo de n-ro 223 de EPĈ devas esti interŝanĝitaj.

## Enhavo

Sekvi Ĉefkomandanton Ĝu De . . . . . . . . 2

Naskiĝo de la standardo de ĈPLA . . . . . . . 6

Daĝaj-tipa Gubernio sur la Jangzi-rivera Delto . . 8

Akvoriĉa Vuhi-gubernio en lerno de Daĝaj . . . . . . 8

Antaŭen al pli bona produktado . . . . . . . . . 13

Juna industrio de komunumoj kaj produktaj brigadoj . . 16

Pri la "Agrikultura Okpunkta Ĉarto" . . . . . . 21

KURANTAJ AFEROJ . . . . . . . . . . . 22

Infana fervojo . . . . . . . . . . . . . 23

Himno al herooj . . . . . . . . . . . . 27

Vizito al la Ekspozicio pri Lerno de Daking en Industrio . . . . . . . . . . . . . . . . 33

Kreskado de kvin georfoj . . . . . . . . . . 37

Bonvenon al amikaj artistoj eksterlandaj . . . . . 40

ĈINAJ NACIECOJ: Ĝing-oj . . . . . . . . . . 44

EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La Revolucia Movado de la Tajping-a Ĉiela Regno . . . . . 46

TEATRAĴOJ KAJ FILMOJ: Pri la moderna dramo "La Longa Marŝo" . . . . . . . . . . . . 49

Envaza floraranĝo de Suĝoŭ . . . . . . . . . 52

LI ŜUHUAJ:

# Sekvi Ĉefkomandanton Ĝu De

JAM estas la unua datreveno de forpaso de la estimata kaj amata Kamarado Ĝu De. Li estis granda proletara revoluciulo de la ĉina popolo kaj eminenta komunisma batalanto. Li estis simpla, sed granda homo. Lia forpaso ekstreme malĝojigis la tutan partion, la tutan armeon kaj la tutan popolon de Ĉinio, kaj vekis profundan sopiradon al li.

Dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, Kamarado Ĝu De estis Ĉefkomandanto de la Okavoja Armeo reorganizita el la Ĉina Ruĝa Armeo. Mi laboris kiel gardisto de Ĝu De ekde la Evento de "La Sepa de Julio" provokita de la japanaj agresantoj en 1937 ĝis la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito. La aferoj okazintaj antaŭ pli ol 30 jaroj ankoraŭ restas freŝaj en mia memoro.

(I)

En septembro de 1937, direktate de Ĉefkomandanto Ĝu De ni startis de Ŝenhi-provinco kaj marŝis orienten al la kontraŭjapana fronto trans la Flava Rivero.

Ni envagoniĝis ĉe urbeto Hoŭma de Ŝanhi-provinco. Pro bombado kaj pafado de japanaj aviadiloj al la fervojo nia trajno devis halti tage kaj veturi nokte. Kiam ni atingis la stacion Hongĝaŭ, jam tagiĝis. Ĉefkomandanto Ĝu De kaj kelkaj aliaj ĉefoj paŝis el la stacio, kaj lokanoj tuj ĉirkaŭis nin por esprimi sian varman bonvenigon. Ni estis multe kuraĝigataj de tio.

En matenkrepusko Ĉefkomandanto Ĝu intime interparolis kun la lokanoj pri kontraŭjapana nacisava vero. Li diris: "La japanaj rabistoj okupas nian teron kaj intencas engluti nian landon. Ni absolute ne estu sklavoj sen patrio. Se ni armeanoj kaj popolanoj nur tenas nin en unuiĝo kaj sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, ni certe povos fiaskigi la agresantojn kaj certe gajnos la Kontraŭjapanan Rezistmiliton!"

Survoje ni vidis grupojn kaj grupojn da Kuomintangaj soldatoj retiriĝantaj de la fronto en konfuzo kaj paniko. Ni marŝis antaŭen, dum ili iris returnen.

En militirado Ĉefkomandanto Ĝu diris al ni: "En la nova situacio nia Okavoja Armeo devas disvolvi la gloran revolucian tradicion de la Ruĝa Armeo. Ĝi estas kaj trupo batala kaj trupo labora kaj produkta." Li instruis al ni, ke ni devas militi kun la malamikoj kaj bone fari propagandan laboron al amasoj, al amikaj trupoj kaj eĉ al malamikaj trupoj; kaj samtempe ni ankaŭ devas mem produkti kaj helpi amasojn solvi malfacilojn. Nur tiel ni meritas la nomon de popola armeo.

Atinginte la fronton, ni tuj komencis batalon kontraŭ la malamikoj. Tri divizioj de la Okavoja Armeo agis respektive kaj gajnis la batalon. La novaĵo vaste cirkulis kaj vigligis popolamasojn. Lokanoj diris: "Sen la Okavoja



*En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito Prezidanto Maŭ kaj Kamarado Ĝu De interkonsiliĝis por direkti la militon.*

Armeo nia Ŝanhi-provinco delonge jam pereus!"

Tiam ni klare sciis: "Sen popolamasoj la Okavoja Armeo ja ne havus forton." Tial, escepte de militado ni preskaŭ ĉiutage faris propagandan kaj organizan laboron al amasoj. Ĉefkomandanto Ĝu ofte venis inter amasojn. Li jen faris paroladon ĉe mitingo, jen interparolis kun kamparanoj en ilia hejmo, jen laboris kune kun kamparanoj en kampo. Ankaŭ ni gardistoj faris amasan laboron kune kun Ĉefkomandanto Ĝu. Ni propagandis la kontraŭjapanan nacisavan politikon de la Partio kaj alvokis, ke la popolanoj unuiĝu kaj liveru ĉu homfortojn kaj monon aŭ pafilojn kiujn ili havas, por rezisti la japanajn agresantojn. Ni ankaŭ helpis amasojn en starigo de milicioj, memdefendaj trupoj kaj kontraŭjapanaj organizajoj de junuloj, virinoj kaj infanoj. Krom tio ni ankaŭ partoprenis en konstruado de la regpotenco, ekonomio, kulturo kaj eduko. Ĉefkomandanto Ĝu iam diris: "La ĝenerala principo de nia armeo estas: Ĝi devenas el kaj servas al la popolo. Nur tiam ni povas fari la popolan militon, kiam ni plenumis la servon al la popolo kaj plibonigis la vivon de la popolo en politiko, ekonomio kaj kulturo."

Dank' al tio, ke Ĉefkomandanto Ĝu bone plenumis la instrukciojn de la Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj sin apogis sur la amasoj, la Okavoja Armeo rapide kreskis en la batalo, fondis la kontraŭjapanajn bazlokojn kaj fariĝis la ĉefa forto en rezisto kontraŭ japanaj agresantoj, kiu peze batis la japanajn agresantojn kaj faris kontribuon por gajni la militon. La amasoj aktive subtenis la Okavojan Armeon kaj aperis multaj kortuŝaj scenoj: Patrinoj sendis sian filon kaj edzinoj sian edzon al la

armeo. Tiel la Okavoja Armeo rapide kreskis de dekmiloj ĝis centmiloj da personoj.

### (II)

Post la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la tutlanda popolo postulis, ke ĉiuj kontraŭjapanaj fortoj unuiĝu kaj unuanime batalu kontraŭ la malamikoj. Dank' al klopodado de la Komunista Partio de Ĉinio, la Kuomintanga Registaro negativa en la Rezistmilito kaj aktiva en opono kontraŭ la Kompartio kaj la popolo estis devigita kunlabori kun la Komunista Partio de Ĉinio en la Rezistmilito. Tiam Kamarado Ĝu De estis kaj ĉefkomandanto de la Okavoja Armeo kaj vicĉefkomandanto de la Dua Milita Regiono de Kuomintango, tial li direktis parton de la Kuomintanga armeo. Traktante la Kuomintangan armeon, li persistis en la principoj "kaj unuiĝi kaj batali", kaj "batali por unuiĝi".

En la plej malfacilaj jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito, granda parto de la Kuomintanga armeo kapitulacis al la japanaj agresantoj kaj fariĝis pupa armeo, kaj ĝia resta parto tre timis vidi japanajn soldatojn kaj tuj frakasiĝis je renkontiĝo kun ili. Forfuĝante ili forlasis ĉie siajn pafilojn, kanonojn kaj grenadojn, sed ili neniam forgesis rabi la havajojn de la popolo, ekz. orajn, arĝentajn objektojn, ŝtofojn k. a. De tio ni tre koleriĝis, tamen ni devis aĉeti la armilojn kolektitajn de lokanoj sur la batalkampo por armi nin mem kaj samtempe admonis Kuomintangajn armeanojn al la kontraŭjapana nacisava milito. Sekvante Ĉefkomandanton Ĝu mi iafoje iris al la Kuomintanga armeo kaj vidis, ke li faris paroladon al oficiroj de la Kuomintanga armeo, pacience instruante ilin: "Ni ĉiuj estas ĉinoj. Antaŭ la invadantoj ni nepre devas havi klaran sintenon: Ĉu ni volontas esti sklavoj aŭ bravaj ĉinoj? La japanaj agresantoj volas pereigi nian landon, ni nepre devas persisti en rezisto kaj preni sur nin la sanktan devon por la lando, nacio kaj popolo. Se ni sincere praktikos la principojn de la Kontraŭjapana Nacia Unuecfronto kaj starigos bonan rilaton kun la popolo, ni certe povos venki la japanajn agresantojn. Se oni forkuros vidante la invadantojn aŭ ŝanceliĝos, kompromisos kun kaj eĉ kapitulacos al la japanaj agresantoj kaj daŭre faros subpremadon al la popolo, do tio signifas ne nur fari krimon, sed ankaŭ fali en senelirejon."

En la Kuomintanga armeo oficiroj pritraktis la soldatojn kiel sklavojn, ekspluatis ilin kaj malversaciis soldojn, dum la soldatoj ne povis akiri sufiĉajn manĝojn kaj vestaĵojn. En tiu stato Ĉefkomandanto Ĝu ofte mobilizis amasojn sendi grenon al ili por ke ili povu vivi pli bone.


En kunago de internaciaj reakciuloj Ĉiangkajŝek-kliko ne nur sabotis en la rezistmilito, sed ankaŭ levis enlande foje-refoje altan tajdon kontraŭkomunistan kaj kontraŭpopolan. Tiam en la Kuomintanga armeo oni praktikis tian politikon al la Okavoja Armeo kaj popolo: "Arestu homon, forprenu pafilon kaj mortigu kadron en ĉiu ajn ŝanco". Utiligante la balaadon de la japanaj invadantoj al la liberigitaj regionoj, Kuomintangaj trupoj surprizatakis la Okavojan Armeon por okupi niajn bazlokojn. La montregiono Tajhangŝan kie estis la ĉefstabo de la Okavoja Armeo fariĝis grava atakcelo de Kuomintango en ĝia kontraŭkomunista alttajdo. Tiutempe en la Kuomintanga armeo troviĝis armeestro nomata Ĝu Huajbing, avanulo en kontraŭkomunista kaj kontraŭpopola tajdo. En printempo de 1940, kun dekoj da rajdantoj Ĝu Huajbing venis al Vanggialing, kie sidis la ĉefstabo de la Okavoja Armeo kaj arogante postulis de ni terenon ordonante ke ni retiriĝu de la bazloko. Ĉefkomandanto Ĝu kaj diviziestro Liu Boĉeng akceptis lin kaj faris vid-al-vidan intertraktadon. El la interesoj de la tuta popolo Ĉefkomandanto Ĝu pacience admonis lin: "Vi devas direkti viajn pafilojn al la japanaj agresantoj; se vi incitas konflikton kun ni kaj oponas kontraŭ la Kompartio kaj popolo, tio nur povas dolori la intimulojn kaj ĝojigi la malamikojn." Ĉefkomandanto Ĝu montris serioze: "La bazloko de la Okavoja Armeo estas reprenita de ni el sub la okupo de la agresantoj kaj necesa kondiĉo kreita de ni por rezisti kontraŭ la agresantoj kaj savi la nacion. La popolo neniel konsentos vian okupon de nia loko. Se vi volas terenon, reprenu la vastan regionon okupatan de la agresantoj, ĉu tio ne estas pli bona? Se vi atakos nian

bazlokon, ni sendube faros memdefendon." Aŭdinte la justan kaj severan diron de Ĉefkomandanto Ĝu, Ĝu Huajbing koleriĝis sed ne kuraĝis diri ion. Post reveno, li tuj komandis tri Kuomintangajn armeojn por ataki la regionon de Tajhang-montaro en kunago de japanaj agresantoj. Sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ **"se neniu atakos nin, ni atakos neniun; se iu atakos nin, ni certe kontraŭatakos lin!"** Ĉefkomandanto Ĝu mobilizis la lokanojn kaj armeanojn de la montregiono al memdefendo. En du kaj duona tagoj ni frakasis la malamikajn trupojn kaj ekstermis tri diviziojn de Ĝu Huajbing, kaj li mem fuĝis en la urbon Luojang kun vundo.

Nelonge post la venko super Ĝu Huajbing, por unuanime rezisti daŭre kontraŭ la japanaj agresantoj, Ĉefkomandanto Ĝu persone iris al Luojang por intertrakti kun la Kuomintanga armeo. Tiam ni sciis, ke Ĉefkomandanto Ĝu iris al Luojang por efektivigi la politikon de Kontraŭjapana Unuecfronto de Prezidanto Maŭ kaj akiri unuigeblajn fortojn en la Kuomintanga armeo, kiuj eble povos rezisti kontraŭ la japanaj agresantoj aŭ almenaŭ ne oponos kontraŭ la Kompartio kaj la popolo. Sed konsiderante, ke la Kuomintanga armeo ne povas havi sincerecon por la traktado kaj estas multaj Kuomintangaj detektivoj en Luojang, ni tre maltrankviliĝis de sekureco de Ĉefkomandanto Ĝu. Konjektinte tion Ĉefkomandanto Ĝu diris al ni: "Nur se Kuomintango ne kapitulacas al Japanio, ni ankoraŭ devas persisti en la Kontraŭjapana Unuecfronto. Ĉifoje ni batis ilin ankaŭ por kuna rezistado en unuiĝo kontraŭ Japanio. Ne pripensu pri mia persona sekureco. Ni devas rigardi la unuecfronton kaj kontraŭjapanan nacisavon pli gravaj ol ĉio alia."

Ni kelkdek kamaradoj ekiris sekvante Ĉefkomandanton Ĝu. Trairante la bazlokojn ni

*En 1937, Kamarado Ĝu De laboris kiel ĉefkomandanto de la Okavoja Armeo. La foto montras ke li faras raporton al komandantoj kaj soldatoj.*



estis bonvenigataj kaj akompanataj de armeanoj kaj lokanoj. Tie prezentiĝis plena vigleco: Energia produktado, milita trejnado, kantado kaj ĝoja rido. Sed kiam ni enpaŝis la lokojn okupatajn de la Kuomintanga armeo, la stato estis tute alia. Ĉie estis ĥaoso kaj veado, nur malmultaj homoj laboris en kampoj, kaj la Kuomintangaj soldatoj montriĝis deprimitaj.

En Luojang, la ĉefoj de la Unua Milita Regiono de Kuomintango akceptis Ĉefkomandanton Ĝu kaj havis du malsamajn sintenojn al li. Iuj el ili havis langon mielan sed koron kruelan kaj intencis malliberigi kaj murdi lin, kaj aliaj konsentis kunan reziston influite de la Kontraŭjapana Nacia Unuecfronto de la Komunista Partio de Ĉinio. Laŭ tiu stato Ĉefkomandanto Ĝu ĉiam persistis en principa starpunkto, pacience admonadis ilin kaj fine atingis la interkonsenton ke la du flankoj provizore observas rilaton de la unuecfronto. Sub la influo de la politiko de la Komunista Partio

# Naskiĝo de la standardo de ĈPLA

EN la komenco de la jaro 1949, la Ĉina Popola Liberiga Milito estis baldaŭ gajnonta la tutlandan venkon. Antaŭvidinte la venontan situacion tiutempe Prezidanto Maŭ kaj CK de la Partio kiuj komandis, en Hibajpo-vilaĝo de Pingŝan-gubernio de Hebej-provinco, la militon en la diversaj batalkampoj de la tuta lando, instrukciis, ke la Ĝenerala Stabo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo faru projektojn pri standardo kaj emblemo de ĈPLA. Tiun laboron direktis Vicprezidanto Ĝoŭ Enlaj mem. Laŭ lia instrukcio la Ĝenerala Stabo informis la kampajn armeojn, ke ili sendu elektitajn projektajn desegnojn al ĝi. Dum ekzameno de la senditaj projektoj, Prezidanto Maŭ mem aŭskultis raporton pri la laboro kaj instrukciis, ke sur la standardo troviĝu la ĉinaj ideografiajoj signifantaj "la unua de aŭgusto" por marki la historian festotagon en kiu la ĉina popolo faris arman Nanĉang-an Leviĝon*, kaj ke sur la standardo devas esti kvinpinta stelo simbolanta la absolutan gvidon de la Partio al la popola armeo. Vicprezidanto Ĝoŭ montris, ke la standardo devas preni ruĝan koloron, la revolucian kaj tradician festan koloron por la amasoj kiel fonon, kaj detale instrukciis al ili, ke la stelo kaj vortoj estu flavaj, la stango estu spirale striita en ruĝo kaj flavo kaj portu ĉe la supra fino lancpinton kaj ruĝan kvaston, kiuj simbolas la devenon de la popola armeo. Tiuj instrukcioj montris la direkton de la projekta laboro. Post multfoja interkonsiliĝo kaj rebonigo la desegna projekto estis fine difinita kaj oni faris laŭ ĝi la unuan standardon de ĈPLA.

Kiam la unua standardo estis sukcese farita, la kampanjoj de Liaŭhi-Ŝenjang, Huajhaj kaj Bejping-Tiangin estis venke finitaj. Prezidanto Maŭ ordonis fari landskalan ofensivon kaj miliono da ĈPLA-anoj transiris Jangzi-riveron. La malamika armeo fuĝis panike, kaj Nankino estis rapide liberigita kaj la reakcia regado de Kuomintango estis finita. La Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ eniris en la okcidentan antaŭurbon de Pekino. En tiu

de Ĉinio, sub edukado kaj helpo de Ĉefkomandanto Ĝu, iuj oficiroj de la Kuomintanga armeo faris utilajn laborojn por la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la liberiga afero de la popolo; parto el ĝiaj soldatoj aliĝis al la Okavoja Armeo kaj kontribuis al la Kontraŭjapana Rezistmilito.

En la poemo «El Tajhang-montaro» verkita de Ĉefkomandanto Ĝu en majo, 1940, estas jenaj versoj:

*Jen krestoj de Tajhang-montaro staras kiel muro,*
*kaj la natura baro Huanghe* fluas sub l' okuloj,*
*milita fajro arde flamas sur la ambaŭ bordoj,*
*per nia marŝo certe venĝos sin la samsortuloj.*

(Daŭrigota en la venonta numero)

---

* La Flava Rivero




vespero de frua somero de 1949, koncerna funkciulo kun la standardo sur la ŝultro venis kune kun Vicprezidanto Ĝoŭ al la loĝejo de Prezidanto Maŭ sur la kvieta Hiangŝan-monto. Oni starigis la standardon sur la gazono antaŭ la domo. Milda vento vespera blovis tra la montoj kaj verdaj arbaroj kaj flirtis en ĝi la standardo, kiu aspektis eĉ pli brila kaj majesta en la vesperruĝo.

Vicprezidanto Ĝoŭ persone raportis al Prezidanto Maŭ pri la farado de la standardo. Aŭskultante la raporton kaj rigardante la standardon Prezidanto Maŭ jen kaj jen kapjesis. La 15-an de junio, la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Partio publikigis ordonon pri eldono de la armea standardo, kaj sekve naskiĝis la standardo kun la surskribo "Unua de Aŭg.". La ordono diris ke la standardo montras, ke la Ĉina Popola Liberiga Armeo fondita je la 1-a de aŭgusto en la Nanĉang-a Leviĝo de 1927 kaj hardita en longa batalado prilumas la tutan landon per sia brila stelo.

---

** Kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Ĝu De, He Long, Je Ting, Liu Boĉeng, Ĉen Ji k.a. gvidis la Leviĝon.*

# Akvoriĉa Vuhi-gubernio en lerno de Daĝaj

de **LONG LIN** kaj **HONG HUŜi**

*Pri la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo en nia lando ni faris serion da raportoj. La plejparto de la donitaj ekzemploj troviĝas en regionoj relative malfekundaj, tamen la nun prezentata Daĝaj-tipa gubernio troviĝas sur la riĉa Jangzi-rivera Delto. El la artikoloj kaj bildoj pri ĝi en tiu ĉi numero vi vidos, kial kaj kiel tiu loko abunda je rizo kaj fiŝoj kun malsamaj naturaj kondiĉoj ol tiuj de Daĝaj lernas de Daĝaj kaj kia ŝanĝo okazis al ĝi pro la lernado.*

**— La Red.**

En la komenco de ĉijara somero ni vizitis la longe sopiratan akvoriĉan gubernion Vuhi sude de Jangzi-rivero.

Vuhi estas unu el la 25 avangardaj gubernioj de Giangsu-provinco en lerno de Daĝaj. Ĝi situas en la norda parto de la Jangzi-rivera Delto kun milda klimato, sufiĉa pluvo kaj fekunda tero. Ĝi multe produktas rizon, silkon kaj dolĉakvajn fiŝojn. Kun Tajhu-lago en la sudokcidento, ĝi estas pitoreska kaj riĉa je vizitindaj historiaj lokoj, tial ĝi kiel turisma urbo famiĝas en nia lando. Ĝi havas reton de riveroj oportunaj por irigacio kaj surakva trafikado.

Ni informiĝis antaŭe, ke Vuhi atingis grandan sukceson en la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo en la lastaj jaroj. Transpasinte ĝian limon ni estis tuj absorbitaj de la vidajoj de prospereco: sur la vasta kamparo iuj komunumanoj estis flegantaj tritikon, aliaj vigle ebenigis rizplantidajn bedojn per traktoroj kaj transplantis rizidojn kaj triaj kolektis aŭ preparis sterkon; sur la riveroj veturis ŝipoj plenŝarĝitaj per kemia sterko, insekticido kaj aliaj materialoj por agrikulturo. Ĉie vidiĝis sceno vivecplena.

## DE KIE KOMENCI LERNADON DE DAĜAJ?

Respondeculo de tiu gubernio diris al ni: Vuhi nun havas pli ol 980,000 loĝantojn sed nur 830,000 muojn (1 muo = 1/15 hektaro) da agroj. Pro la malmulteco de agroj, kampo valoras kiel oro. Kvankam la naturaj kondiĉoj de Vuhi tre favoras al kreskado de agrikulturaj plantoj, tamen en la pasinteco ofte okazis inundo pro longa neriparado de la digoj kaj malordo de la akvosistemo kaŭzitaj de la fuŝa administrado de la reakcia Kuomintang-a registaro. Precipe la mal-

alta areo en la okcidenta parto suferis naturan katastrofon preskaŭ ĉiujare. Sed la kampoj relative altaj ofte suferis trosekecon. La antaŭa kroniko de la gubernio enhavas multajn notojn pri tragikaj scenoj post inundo. Poemo pri tio legiĝas jene:

*Diluv' englutis nian domon,*
*sed ni ne povas iĝi fiŝoj;*
*mi migras larme kun l' infanoj*
*kaj kiam ni revenos hejmen?*

Kaj krome la bienuloj kruele ekspluatis la kamparanojn, tial la lastaj devis forlasi sian hejmlokon kaj migris al Ŝanhajo kaj aliaj urboj por fariĝi laboristoj kaj servistoj.

Post la Liberiĝo, la kamparanoj suriris la vojon de kolektivigo responde al la alvoko de la Partio post la agrara reformo, kaj la produktado disvolviĝis jaron post jaro. Tamen pro la ĝenado de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, iliaj paŝoj en antaŭeniro estis nerapidaj. Ekde la jaro 1964, tra la tuta lando disvolviĝis la amasa movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo, tamen iuj gvidantoj de la partia komitato de Vuhi-gubernio opiniis, ke ilia loko estas akvoriĉa kaj havas bonajn kondiĉojn, do estas nenecese fari tian grandan reformon al la naturo. En akvoutiliga konstruado oni faris tie nur bagatelajn riparojn, sed ne plene mobilizis la amasojn por fari laŭplanan fundamentan agraran konstruadon kiel en Daĝaj.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, la amasoj leviĝis kaj kritikis la reviziisman linion, kio multe inspiris tiujn gvidantojn de la gubernia partia komitato. En 1970, la Agrikultura Konferenco de Norda Ĉinio laŭdis la revolucian spiriton de Hijang-gubernio de Ŝanhi-provinco, kiu sukcese konstruiĝis en Daĝaj-tipan gubernion en tri jaroj kaj la partia komitato de Vuhi estis stimulita de tio. Ĝiaj gvidantoj demandis al si: "Se Daĝaj povas reformi montojn, kial ni ne povas ordigi akvojn? Se Hijang kun tiel malbonaj naturaj kondiĉoj povis ŝanĝi sin en Daĝaj-tipan gubernion en tri jaroj, kial ni ne povas tion fari?" La partia komitato decidis movi la popolon de la tuta gubernio por energie lerni de Daĝaj kaj kuratingi Hijang.



*Grena tenejo de Luoŝe-komunumo de Vuhi*

De kie oni devas komenci en lerno de Daĝaj? Dongting-brigado donis bonan ekzemplon al la tuta gubernio.

Tiu brigado troviĝas tre proksime de la urbo kaj ĉiu homo havas meznombre nur 0.6 muon da agro. Antaŭ la kultura revolucio, iuj opiniis, ke ili havas nur malmulte da agroj, kaj ne multe da mono ili povas akiri, kiel ajn alta estas la hektara produktokvanto de greno. Tial iuj produktaj taĉmentoj blinde vastigis la areon de legomkampoj kaj nombro da komunumanoj sin donis al flegado de privataj parceloj kaj entrepreno de familia metio kaj ne interesiĝis pri la kolektiva produktado. Tia stato daŭris ĝis la

komenca periodo de la kultura revolucio. Pro la malbona influo de la anarkiisma pensfluo energie instigita de Lin Biaŭ kaj la "kvarpersona bando" de Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ, tia kapitalisma tendenco eĉ plifortiĝis. Rezulte de tio la produktokvanto de greno de la tuta brigado malgrandiĝis kaj la enspezo de la plejparto de la komunumanoj malmultiĝis.

Sub la helpo de labora grupo alsendita de la gubernia partia komitato, la partia filio de la brigado movis la komunumanojn studi la instruon de Prezidanto Maŭ **"nur socialismo povas savi Ĉinion"** kaj memorigis ilin pri la suferoj en la malnova socio kaj pripensigis ilin pri la feliĉo post la Liberiĝo, por ke ili distingu la ĝustan linion de la malĝusta. La travivaĵo de maljuna malriĉkamparano Ĝang Genfu estis tre bona ekzemplo. En la malnova socio, lia familio havis neniom da tero. Pro tio ke lia patro ne povis vivteni la familianojn, lia patrino devis reedziniĝi al alia viro. Lia patro migris aliloken kun li. Kiam li estis 13-jara, li jam laboris kiel jara dungito por bienulo kaj vivis en malsato kaj frosto. Post la Liberiĝo, li ricevis teron kaj domon, sed pro malsano kaj manko de agrikulturaj instrumentoj li devigite forvendis la ricevitan teron. Poste, fondiĝis agrikultura kooperativo kaj lia familio komencis sian feliĉan vivon. Rememoro pri la doloraj pasintaĵoj akrigis la vidon de la komunumanoj. Iu diris: "Ni ne devas forgesi la doloron post kuraciĝo de absceso. Se ni iros la malnovan vojon de unuopa mastrumado, la plejparto de ni denove falos en suferojn." Alia diris: "Se ni kamparanoj ne produktus grenon kaj postulus tion de la ŝtato, de kie do la ŝtato akiru grenon? Kaj kiel ni povos konstrui socialismon?" Dank' al edukado, la elmigrintaj komunumanoj revenis al la produktaj taĉmentoj kaj partoprenis en kolektiva produkta laboro.


Havante malmulte da agro, ili do klopodis kreskigi plantaĵojn de pluraj rikoltoj en ĉiu jaro en difinita areo. En 1970, ili lernis sperton de alia loko kaj kulturis sur sama parcelo unufoje tritikon kaj dufoje rizon, kaj la hektara produktokvanto atingis 12,082.5 kg. La familiaj metiproduktaj entreprenoj fariĝis kolektivaj, la brigado fondis fabriketojn kaj la enspezo de la komunumanoj pliiĝis kun ĉiu jaro. La hektara produktokvanto de greno atingis en 1976 pli ol 17,250 kg. Ĉiujare en la pasintaj 6 jaroj, ĝi vendis al la ŝtato 300 tunojn da greno.

La gubernia partia komitato disvastigis en Dongting-komunumo la sperton de Dongting-brigado kaj turnis tiun komunumon en la unuan avangardan unuon de la gubernio en lerno de Daĝaj. Poste en la tuta gubernio disvolviĝis



*Riĉa rikolto de tritiko*

*Komunumanoj de Mejcun-komunumo ebenigas teron.*






aktivadoj de lerno de Daĝaj kaj klopodado por kuratingi Dongting. Kaj la kultiva sistemo de tri rikoltoj en unu jaro estis disvastigita. Kaj samtempe kun tio fondiĝis multaj komunumaj kaj brigadaj fabriketoj.

## EN LA VICOJN DE AVANGARDAJ UNUOJ

Sed la disvolviĝo estis ne ekvilibra. 13 komunumoj en la okcidenta parto de Vuhi troviĝas en malalta tereno kun relative malbonaj naturaj kondiĉoj, tial ili progresis malpli rapide ol la orienta parto. Por ŝanĝi tian staton, la gvidanto de la gubernia partia komitato mem iris al la plej malalta Juki-komunumo por ĝin helpi. Ĵonghi-brigado de tiu komunumo havis relative multajn problemojn. Por gajni monon, ĝiaj 8 produktaj taĉmentoj ĉiuj bredis fiŝidojn per terspaco kaj laborfortoj transprenitaj de agrikultura produktado. En 1972, ĝia produktokvanto de greno multe malkreskis.

Sub la helpo de la gubernia partia komitato, tiu komunumo movis la amasojn de Ĵonghi por diskuti la demandon, kion oni devas celi kaj por kio oni uzu sian energion. Ili faris jenan kalkulon: En 1972, la brigado gajnis pli ol 20,000 juanojn per vendo de fiŝidoj, sed ĝia produktokvanto de greno malpliiĝis je 150 tunoj, la grena porcio de la komunumanoj estis malgrandigita kaj ĝi ne plenumis la taskon de livero de komerca greno al la ŝtato. La fakto profunde edukis la komunumanojn. De tiam, ili aktive disvolvis multflankan produktadon kiel bredadon de porkoj, silkraŭpoj kaj fiŝoj metante grenproduktadon en la unuan lokon laŭ la principo "preni grenproduktadon kiel la ĉefĉeneron kun samtempa disvolvo de la aliaj", kaj la tuta brigado prosperis en ĉiuj produktaj branĉoj. Ankaŭ plejparto de la brigadoj de Juki-komunumo spertis preskaŭ la saman ŝanĝon. La hektara produktokvanto de greno de la tuta komunumo atingis en 1973 10,080 kg. kaj fariĝis avangarda komunumo de la gubernio en lerno de Daĝaj.

La ŝanĝo de Juki-komunumo akcelis la movadon de lerno de Daĝaj en la tuta gubernio. En 1975, la hektara produktokvanto de greno de la tuta gubernio preskaŭ atingis 11,250 kg., ĝia totala produktokvanto superis 500,000 tunojn kaj ĝi liveris al la ŝtato 170,000 tunojn da greno. En la Tutlanda Konferenco pri Lerno de Daĝaj en Agrikulturo okazigita en 1975, Vuhi estis listigita inter la avangardajn guberniojn en lerno de Daĝaj.



*Gvidanto de la gubernio Vuhi sur produkta fronto*

al tio. En la unua duonjaro ili okazigis kunvenojn de reprezentantoj de la tuta gubernio por lerni de Daĝaj en agrikulturo kaj lerni de Daking en industrio, en kiuj oni parolis fiere pri la sukcesoj atingitaj en 1975 kaj laŭdis la avangardajn unuojn kaj personojn. La gubernia partia komitato decidis, ke la laboraj grupoj por lerno de Daĝaj ne devas esti retiritaj, la kritikado kontraŭ reviziismo kaj kapitalismo nek ĉesigita kaj la konstruado de socialismo nek malstreĉita.

En la lasta tagdeko de junio, Ĉefministro Hua Guofeng sankciis la Ĉelokan Kunvenon de Rizkulturado de Suda Ĉinio okazigitan en tiu gubernio kaj Vicĉefministro Ĉen Jongguj faris gravan raporton en tiu kunveno. En tiu raporto, la sukcesoj atingitaj de Vuhi estis jesitaj. De tio la kadroj kaj komunumanoj de la tuta gubernio estis forte stimulitaj. En oktobro, la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Hua kiel la ĉefo frakasis la intrigon de la "kvarpersona bando" uzurpi la Partion kaj transpreni la regpotencon. Tio multe levis la revolucian kaj produktan entuziasmon de la popolo de la tuta gubernio, kiu prezentis siajn eminentajn atingojn en industria kaj agrikultura produktadoj al la Dua Tutlanda Konferenco pri Lerno de Daĝaj en Agrikulturo okazigita en decembro. Kaj krome ili elmetis la devizon: "Penlaboradi 1 aŭ 2 jarojn por efektivigi hektaran produktokvanton de 15 tunoj da greno en la tuta gubernio. En la pasinta vintro kaj la ĉijara printempo, kritikante la krimojn de la "kvarpersona bando" en subfosado de la revolucio kaj produktado, la popolo de Vuhi faris ankoraŭ pli grandskalan agraran fundamentan konstruadon. Ankoraŭ pli bela perspektivo aperas en la pitoreska riĉa gubernio abunda je akvo.

## ĈIAM ENERGIA LABORADO POR SOCIALISMO

En 1976, kiam la popolo de Vuhi estis energie efektiviganta la decidojn de la Unua Tutlanda Konferenco pri Lerno de Daĝaj en Agrikulturo kaj klopodanta por konstrui altnorman Daĝajtipan gubernion, fidelaj sekvantoj de la "kvarpersona bando" en Giangsu-provinco tamen riproĉis ĝin inversante pravon kaj malpravon. Ili diris ke la labora grupo sendita de la gubernia partia komitato "praktikas burĝan reakcian linion", la kritikado kontraŭ kapitalismo "batas la amasojn" kaj Vuhi-gubernio estas "nigra modelo" en praktiko de la teorio de produktaj fortoj.

Tiam la gubernia partia komitato de Vuhi sentis tre fortan premon, sed ĝiaj membroj pensis, ke lerni de Daĝaj estas granda alvoko farita de Prezidanto Maŭ, la ĝenerala direkto ne eraras kaj la sukcesoj atingitaj de Vuhi estas ĝuste rezulto de la lerno de Daĝaj. Ili agis spiteme

Daĝaj-tipa Gubernio sur la Jangzi-rivera Delto

# Antaŭen al pli bona produktado

LA movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo tre efike mobilizis la aktivecon de la popolo de Vuhi. En la lastaj jaroj ĝi peneme laboradis por konstrui novan socialisman kamparon kaj disvolvi la revolucion kaj produktadon, kaj akiris rimarkindajn sukcesojn en agrara fundamenta konstruado kaj scienca terkulturado.

## SERĈI NOVAJN VOJOJN POR PLIIGI LA PRODUKTADON

En la malnova Ĉinio scienca esplorado de kamparanoj estis neimagebla afero, sed nun tio jam fariĝis vigle disvolviĝanta amasa movado. En Vuhi, la gubernio havas agronomian instituton kaj instituton de agrikulturaj maŝinoj, la popolkomunumo agronomian stacion, la produkta brigado agronomian taĉmenton kaj la produkta taĉmento agronomian grupon, en kiu laboras agrikultura teknikisto, akvoadministrantoj kaj semoselektistoj. En la tuta gubernio nun jam troviĝas 40,000 agrikulturaj teknikistoj. Ekde 1970, ili faris ampleksajn kaj efikajn eksperimentojn en kunordigo de grenplantoj por tri rikoltoj en ĉiu jaro, plantado, racia sterkado, irigaciado kaj preventado kaj ekstermado de fiinsektoj kaj plantmalsanoj. Jene ni menciu kelkajn ekzemplojn pri tio:

Per samtempa apliko de diversaj metodoj en eksperimentado kaj komparado pri la rezultoj, komunumanoj de Dongting-brigado akiris sperton en kulturado de fortikaj rizidoj;


En la lastaj jaroj, Ĉunlej-brigado kolektis sterkon dank' al multa bredado de porkoj, elfosis riverfundan ŝlimon kaj preparis alian organikan sterkon el herboj kaj akvosurfacaj plantoj, kaj per tio plibonigis la grundon de sia brigado;

Teknikisto-kamparano Lu Min de Nankjuan-komunumo mem projektis kaj instalis insektokaptilojn sub la helpo de la Prognoza Stacio de Plantmalsanoj kaj Fiinsektoj de la gubernio, por ĝuste anonci la aperon de du ĉefaj specoj de rizaj malutilaj insektoj kaj helpi la amasojn preventi kaj ekstermi ilin. Dum sia surkampa observado kaj esplorado en pluraj jaroj, li akumulis grandan kvanton da materialo, fundamente konis la leĝon de translokiĝo de la malutilaj insektoj kaj faris sian kontribuon en preventado kaj ekstermado de la du specoj de fiinsektoj en la tuta gubernio;


En la lastaj jaroj, juna komunumano An Fanlun de Donghutang-komunumo, kromnomata Semselekta Maniulo, kune kun komunumanoj faris eksperimentojn pri pli ol 200 specioj de rizo kaj elkulturis bonajn semojn.

Ĝuste tiaj sciencaj eksperimentoj de la amasoj kreis favorajn kondiĉojn por stabila alta produktokvanto de greno en tiu gubernio. En la pasinta jaro, la meznombra hektara produktokvanto de greno de la tuta gubernio atingis 12,500 kg. kaj la hektara produktokvanto de greno de 129 produktaj taĉmentoj superis 18,000 kg.

La antaŭa Mejcun-komunumo (antaŭ 1970)




La nuna Mejcun-komunumo





## NOVA IRIGACIA SISTEMO

En Mejcun-komunumo ni vidis tute novan bildon de kamparo: Morusarbaro etendiĝas en longeco de pluraj kilometroj, la bonordaj kampoj similas al ŝaktabulo, rektaj aleoj iras tra la kampoj kun prospere kreskantaj tritikaj plantoj. Estis tamen strange, ke tie ne videblas irigaciaj kanaletoj. Respondeculo de la komunumo informis nin, ke sub ĉiu aleo troviĝas irigacia kanalo kaj en la kampoj inter la du irigaciaj kanaloj je du metroj sub la tero troviĝas drenaj kanaloj. Por irigacii sufiĉas ke komunumanoj malfermu la valvojn ĉe la kamprando, kaj oni fermu la valvojn, se akvo ne estas bezonata, kaj tiam la drenaj kanaloj povas forkonduki la superfluan akvon. Tiu nova irigacia sistemo multe interesis la vizitantojn.

Simile al la plejparto de la komunumoj de la tuta gubernio, frue en 1970 tiu komunumo jam efektivigis irigaciadon per maŝinoj kaj ĝiaj trunkaj kanaloj estis kompletigitaj per kanaletoj. Tamen, kun disvastigo de la nova sistemo de tri rikoltoj en ĉiu jaro, ofte aperis kontraŭdiroj en irigaciado de la kulturataj plantoj, el kiuj iuj bezonas akvon dum aliaj ne, kaj krome sekve de meĥanizo de agrikulturo la malfermaj irigaciaj kanaloj jam ne konformas al la bezono de la nova situacio. Komunumanoj pensis, ke granda kvanto da kampoj povas esti ŝparita kaj la avantaĝo de permaŝina irigaciado povos esti plene disvolvita, se oni konstruos subterajn irigaciajn kanalojn anstataŭ la malfermajn, kaj krome tia aranĝo estas oportuna por la meĥanizado de agrikulturo. Subtenate de la partia filio, malriĉkamparano Giang Hiĉun kaj aliaj komunumanoj de Dongjuan-brigado masonis subteran irigacian kanalon per mortero. Tia konstruaĵo estas malmultekosta kaj facile farebla, kaj tre rapide disvastiĝis tiu metodo. Ekde 1971, la tuta komunumo faris grandskalan agraran konstruadon

La estonta Mejcun-komunumo (en 1985)




fundamentan laŭ la principo aranĝi la kampojn en kvadrataj pecoj kun irigacia kaj drena sistemo, konstrui aleojn sur la subteraj kanaloj kaj formi zonojn de morusarboj surborde de riveroj. En la pasintaj 6 jaroj, stimulate de la Daĝaj-a spirito de penema luktado, la komunumanoj nuligis milon da padoj, ebenigis centojn da neutiligeblaj riverbranĉoj, konstruis 138 kilometrojn da subtera irigacia kanalo kaj kreis centojn da hektaroj da morusarbaroj kaj forstozonoj.


Mejcun-komunumo antaŭenpuŝis la ĝardenigadon de kampoj en novan stadion. En la lastaj jaroj, la komunumoj kaj brigadoj jam aranĝis la plejparton de siaj kampoj en kvadratajn pecojn kaj efektivigis irigaciadon per subteraj kanaloj, imitante la ekzemplon de Mejcun. La plibonigo de produktaj kondiĉoj pretigis favorajn kondiĉojn por pliapaŝa reformo de la kultura sistemo kaj altigi la nivelon de kultivado.

## "OPERACIADO" AL LA TERO

En Kianĝoŭ-komunumo ni vidis alian novan fizionomion de akvoabunda loko: Inundpreventaj kluzoj gardstaras sur la digo, pumpstacioj staras ĉe rivero, du trunkaj kanaloj kun longeco de pli ol 5 kilometroj fluas sude-norde tra la komunumo kaj dekoj da branĉaj kanaloj fluas oriente-okcidente kun interspaco de 200 metroj, kaj la kampoj en samaj grandeco kaj formo estas en bela ordo. Elegantaj pontoj de duoblaj arkoj kuŝas super la ondetantaj kanaloj.

Antaŭ 6 jaroj, tie estis dekoj da dise lokitaj kampoj ĉirkaŭataj de digoj. Tia aranĝo ne konformis al la bezono de reformado de la kultiva sistemo kaj disvolvado de meĥanizado, nek favoras al prevento de inundo kaj drenado de inundakvo. Por rapide disvolvi la agrikulturan produktadon estis necese fari grandan "opera-

*Kolektado de ŝlimo kiel sterko*





*Arta fekundigo*

cion" al la tero de la tuta komunumo. En la potenca amasa movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo, la partia komitato de Kianĝoŭ-komunumo faris planon de kampara akvoutiliga konstruado laŭ la opinioj de la amasoj. Vintre kaj printempe en la lastaj jaroj miloj da komunumanoj partoprenis en la konstruado. En ventegoj kaj torentaj pluvoj, ili konstruis nombron da inundpreventaj kluzoj kaj drenaj pumpstacioj, per kiuj la kamparo bone reordigita estas sekure gardata kontraŭ inundo. Samtempe kun tio, ili fosis novajn kanalojn kaj plenigis la malnovajn fluejojn, ebenigis kampojn kaj konstruis novan irigacian kaj drenan sistemon, tiel ke la fizionomio de la komunumo tute noviĝis. La totala grena produktokvanto pliiĝis je 70 pocentoj kompare kun tiu antaŭ 6 jaroj.

En la lastaj jaroj, la popolo de Vuhi senĉese akiris novajn sukcesojn en konstruado de socialisma agrikulturo. Pli kaj pli multe da greno ĝi liveris al la ŝtato kaj en 1976 ĝi liveris 179,105 tunojn da tio. Sed ĝi ne kontentiĝis je tiuj atingoj, kaj stimulate kaj antaŭenpuŝate de la decidoj de la Tutlanda Konferenco pri Lerno de Daĝaj en Agrikulturo ĝi daŭre marŝas antaŭen kaj klopodas por fari pli grandajn kontribuojn al la ŝtato.

Daĝaj-tipa Gubernio sur la Jangzi-rivera Delto

# Juna industrio kaj produktaj

EN Vuhi ni vizitis multajn fabrikojn de popolaj komunumoj kaj produktaj brigadoj. Kvankam ili estas ne grandaj, tamen ili ludas tre grandan rolon en akcelado de la agrikultura produktado.

## EN DISVOLVIĜO KUNE KUN AGRIKULTURO

Same kiel en la gubernioj Hijang kaj Hujhian kaj Jantaj-subprovinco, pri kiuj ni raportis en la lastaj jaroj, ankaŭ en Vuhi la industrio de komunumoj kaj produktaj brigadoj elkreskis en la disvolviĝo de agrikulturo kaj ĝi ĉiam servas al la agrikultura produktado. Iu respondeculo de la gubernio diris al ni: En tiu loko estas sufiĉe multe da laborkapabluloj, tial oni ne sentis urĝan bezonon de meĥanizo de agrikulturo en la pasinteco. Sed en la Granda Proleta Kultura Revolucio, la popolo de la tuta gubernio lernis de Daĝaj kaj klopodis kuratingi Hijang-gubernion, energie farante fundamentan agraran konstruadon kaj reformon de kultivaj sistemoj, kio bezonis multe da laboruloj. Sekve de tio la laborfortoj montriĝis nesufiĉaj por ĝustatempa plenumo de kultiva tasko. Tiam la membroj de la partia komitato de la gubernio pli bone vidis la ĝustecon de la instruo de Prezidanto Maŭ, ke **"la fundamenta elirejo de agrikulturo estas meĥanizo"**, kaj ili komprenis, ke se oni ne efektivigos meĥanizon kaj elektrizon de agrikulturo post ĝia kolektivigo, oni ne povos plene disvolvi la superecon de kolektivigo, efektivigi

## de komunumoj


## brigadoj

teknikan reformon de agrikulturo, akceli rapidan disvolvon de agrikultura produktado kaj fine venki kapitalismon kaj konstrui socialismon en la kamparo. Tial ekde la jaro 1970, la partia komitato de la gubernio donis grandan atenton pri la konstruado de industrio de komunumoj kaj produktaj brigadoj kaj la komunumoj fondis malgrandajn fabrikojn sin apogante sur la propraj fortoj.

La konstruado de la Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj de Luoŝe-komunumo estas ekzemplo pri tio. En la komenca periodo de konstruado de la fabriko, oni apenaŭ havis kapitalon. La 12 pioniroj komencis la malfacilan konstruadon nur per kelkaj simplaj instrumentoj aĉetitaj kaj la marteloj kaj tenajloj kiujn ili alportis de sia hejmo. Ili uzis ŝtonon kiel stablon kaj tranĉis ŝtalplaton per martelo; ili faris malnovtipan tornilon el forĵetitaj maŝinpartoj de granda fabriko, kaj per tiu tornilo ili mem faris parton de siaj ekipaĵoj. Ili mem faris 100-tunan hidraŭlikan premmaŝinon kaj 3-tunan fandfornon. Nun tiu fabriko jam havas 84 diversajn meĥanikajn ekipaĵojn, per kiuj ili faris en la pasintaj jaroj transplantan maŝinon, draŝan maŝinon, fosmaŝinon, ŝlimsuĉan maŝinon, agrikulturan pumpilon, altpreman ŝprucigilon kaj aliajn agrikulturajn maŝinojn de pli ol dek specoj kaj krome ĝi produktis grandnombre diversajn elektrajn motorojn por kompletigi aliajn agrikulturajn maŝinojn. Ĝi produktis ankaŭ dekojn da miloj da malgarndaj agrikulturaj instrumentoj.

Nun, ĉiu komunumo de tiu gubernio jam havas fabrikon por fari kaj ripari agrikulturajn maŝinojn kaj pli ol 90 pocentoj de la produktaj brigadoj jam havas riparejon de agrikulturaj maŝinoj. Malgrandaj, mezaj kaj grandaj riparoj de agrikulturaj maŝinoj povas esti plenumitaj respektive en la produktaj brigadoj kaj komunumoj.

Samtempe kun tio ankaŭ la industrio entreprenata de la gubernio rapide disvolviĝis. En nur kelkaj jaroj jam fondiĝis unu post alia fabrikoj de malgrandaj traktoroj, dizeloj, agrikulturaj maŝinoj, kemia sterko, elektraj motoroj, cemento kaj cementaj boatoj, elektroĥemia fa-



*Angulo de la Fera-ŝtala Fabriko de Vuhi*


briko, fera-ŝtala fabriko ktp. servantaj kiel spinaj fabrikoj por subtenado de agrikulturo. Nun en Vuhi jam troviĝas 119 entreprenoj funkciigataj de la gubernio, 266 entreprenoj de komunumoj kaj 1511 entreprenoj de brigadoj. 70% de tiuj entreprenoj estas servantaj al agrikulturo. En la lastaj jaroj, iuj el ili ankaŭ prilaboris aŭ produktis por grandaj fabrikoj mikroondajn hejtilojn, alttemperaturajn kaj altpremajn tinkturilojn, lasertubojn kaj tiel plu. La totala industria produktovaloro de la tuta gubernio en 1976 atingis pli ol 456,000,000 juanojn, el kiuj pli ol 250,000,000 juanoj estis liveritaj de entreprenoj de komunumoj kaj brigadoj. La industria produktovaloro de la tuta gubernio konsistigis 67.4 pocentojn de la totala industria kaj agrikultura produktovaloro de la tuta gubernio.

## BONE FUNKCIIGI INDUSTRION POR AKCELI AGRIKULTURON

Unu el la kaŭzoj por la kontinua stabila alta produktado de agrikulturo de Vuhi-gubernio estas la subteno de la industrio de komunumoj kaj produktaj brigadoj. La industriaj entreprenoj de komunumoj kaj brigadoj ne nur liveris grandajn nombrojn da maŝinoj kaj teknikaj laborantoj al agrikulturo, sed ankaŭ liveris kapitalon por agrara konstruado.

Antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, en Vuhi troviĝis tre malmultaj agrikulturaj maŝinoj. En 1965 la tuta gubernio havis nur 6 traktorojn kaj meznombre 29 muoj (1 muo = 1/15 hektaro) havis nur unu ĉevalpovon da movforto por agrikulturaj maŝinoj. Depost 1970, la gubernio ne nur solvis la problemon de riparado de agrikulturaj maŝinoj per sia industrio, sed ankaŭ produktis grandan nombron da malgrandaj traktoroj, draŝmaŝinoj, pumpiloj, elektraj motoroj kaj ŝprucigiloj kaj partoj de agrikulturaj maŝinoj taŭgaj por la loko. En la pasinta jaro, la tuta gubernio produktis 14,500 dizelojn, pli ol 6,500 malgrandajn traktorojn, elektrajn motorojn kun totala kapacito de 321,000 kilovatoj, 17,000 tunojn da sinteza amonio kaj 30,000

*Cementaj tuboj produktitaj de la Fabriko de Cementajoj de Jangŝi-komunumo*



tunojn da cemento. La produktokvanto de malgranda traktoro, dizelo kaj elektra motoro jam superis la bezonon de la gubernio. Nun la totala movforto de agrikulturaj maŝinoj de la tuta gubernio atingis pli ol 247,000 ĉevalpovojn kaj meznombre 3.6 muoj da kampo jam havas unu ĉevalpovon. Nun plugado, irigaciado, draŝado, plantoprotektado kaj prilaborado de greno kaj bestaj nutraĵoj estas jam meĥanizitaj aŭ duone meĥanizitaj kaj 99 pocentoj de la produktaj brigadoj jam uzas elektron.

La meĥanizo de agrikulturo liberigis multajn laborfortojn kaj pretigis kondiĉon por entrepreno de grandskala agrara konstruado kaj disvastigo de la kultiva sistemo de tri rikoltoj de greno en ĉiu jaro. Kaj parto de la ŝparitaj laborfortoj estas uzataj en komunumaj kaj brigadaj fabrikoj kaj flankokupoj. La kvanto de teraĵo kaj ŝtonoj movita en agrara akvoutiliga konstruado de la tuta gubernio kun samtempa disvastigo de la tririkolta kultiva sistemo depost 1970 atingis pli ol 100,000,000 kubmetrojn, t.e. kvaroblo de tiu en la 22 jaroj de 1949 ĝis 1970.

Pli ol duono de la kapitalo bezonata por grandskala agrara fundamenta konstruado de Vuhi venis de la akumulaĵo de la komunumaj kaj brigadaj fabrikoj. La hektara produktokvanto de Kianĝoŭ-komunumo, kiu troviĝas en malalta tereno kun tre malbonaj naturaj kondiĉoj, antaŭe estis relative malalta. En la lastaj jaroj, la komunumo prenis sumon el la akumulaĵo de la fabrikoj de la komunumo kaj brigadoj en ĉiu jaro por akvoutiliga konstruado. Ĝi konstruis 74 kanalojn kun totala longeco de 110 kilometroj, 201 pontojn, 81 irigaciajn pumpstaciojn kaj nombron da drenaj pumpstacioj, kluzoj kaj subteraj kanaletoj. Dank' al tio multe ŝanĝiĝis ĝia natura fizionomio.

## BRILA PERSPEKTIVO

La komunuma kaj brigada industrio ludas ĉiam pli gravan rolon kaj ĝia signifo estas pli kaj pli bone komprenata de la popolanoj. Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ laŭde diris en 1958, kiam popolaj komunumoj komencis starigi komunumajn kaj brigadajn entreprenojn: **"Nia granda kaj brila espero kuŝas ĝuste ĉi tie!"**

Ni prenu ekzemple ĝian rolon en disvolvo de la kolektiva ekonomio de la kamparo. En la nuna stadio, la ekonomio de la produktaj taĉmentoj okupas la ĉefan lokon en la trinivela posedsistemo de popola komunumo, produkta brigado kaj produkta taĉmento. En la pasinteco, la ekonomio de la komunumoj kaj produktaj brigadoj de la tuta gubernio konsistigis tre malgrandan parton de la trinivela ekonomio. Ekzemple, en 1970 ĝi konsistigis nur 21.6 pocentojn. Dank' al energia entrepreno de industrio de komunumoj kaj brigadoj, en 1976 la ekonomio de la komunumoj kaj brigadoj jam konsistigis 65 pocentojn de la totala ekonomio de la trinivela ekonomio. Tio favoras al paŝo-post-paŝa transigo de la nuna trinivela posedsistemo al sola komunuma posedsistemo. Kaj la relative malriĉaj produktaj taĉmentoj povas ricevi de la komunumo kaj brigadoj pli multe da helpo por rapida disvolviĝo.


La disvolviĝo de komunuma kaj brigada industrio ankaŭ povas pretigi kondiĉojn por redukti la diferencojn inter la urboj kaj kamparo, inter la laboristoj kaj terkulturistoj kaj inter la fizika kaj cerba laboroj.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, la industrio de Vuhi havis tre malbonan bazon. Tie troviĝis nur metiejoj krom kelkaj fabrikoj por elbobenigi kokonojn kaj prilabori grenojn. Nun ĝi jam havas malpezan industrion kaj industriojn de fero, ŝtalo, maŝinfarado, ĥemio, tekstilo kaj konstruado. Ĉe ĉiu loko de la oficejo de komunumoj ni vidis fabrikojn, butikon, mezan kaj elementan lernejojn, hospitalon, grenvendejon, poŝtoficejon, aŭtobusan stacion aŭ motorŝipan kajon, kaj krome ankaŭ kulturan stacion, disaŭdigan stacion kaj filmoprojekcian taĉmenton. Formiĝas ĉe ili centro de politiko, ekonomio, kulturo kaj transportado kun karakterizaĵoj de urbo kaj kamparo. Laŭ la bezono de agrikulturo, la komunuma kaj brigada industrio disvolviĝos pliapaŝe, la dislokiĝo de la gubernia industrio fariĝos ankoraŭ pli racia kaj la diferenco inter urbo kaj kamparo pli malgrandiĝos.


Ĉar la fabrikoj de la komunumoj kaj brigadoj praktikas sistemon de kumulo de industrio kun agrikulturo, nome "okupiĝi pri agrikulturo kaj

industrio laŭ la bezono de agrikulturaj sezonoj kaj labori en fabrikoj sed ricevi rekompencon de la produkta taĉmento". Tio favoras al iompost-ioma malgrandigo de la diferenco inter la laboristoj kaj la kamparanoj. En la laborplenaj agrikulturaj sezonoj, ĉiuj laboristoj de la komunumaj kaj brigadaj fabrikoj, escepte de tiuj kiuj nepre devas ripari agrikulturajn maŝinojn kaj prilabori grenon kaj nutraĵojn de dombestoj, partoprenas en agrikulturaj laboroj. Ĉiujare, ili laboras meznombre 8 monatojn en fabrikoj kaj 4 monatojn sur kampoj. La laboristoj de tiuj fabrikoj, inkluzive de iliaj administrantoj, ricevas laborpoentojn same kiel la aliaj komunumanoj, iliaj laborpagoj estas donitaj al la produktaj taĉmentoj kaj ili ricevas rekompencon de la produkta taĉmento same kiel la aliaj komunumanoj laŭ la laborpoentoj. Koncerne al laborsekurigo kaj bonstatigaj aranĝoj, la laboristoj estas same traktataj kiel la aliaj komunumanoj krom necesa laborsekurigo. Tia aranĝo povas preventi grandigon de la diferenco inter la vivniveloj de la laboristoj de la industriaj entreprenoj kaj la aliaj komunumanoj, stabiligi la agrikulturajn laborfortojn kaj disvolvi la aktivecon de la vastaj amasoj, tiel ke la komunumanoj laborantaj en la fabrikoj prizorgas la agrikulturan produktadon kaj la aliaj komunumanoj prizorgas la disvolviĝon de la fabrikoj, kaj la industria kaj agrikultura produktado povas ricevi plenampleksan disvolviĝon.

*Lasertuboj produktitaj de la Aparat-elementa Fabriko de Luoŝe*



*Ŝipfarejo de Kianĝoŭ-komunumo*




## Daĝaj-tipa Gubernio sur la Jangzi-rivera Delto

# Scienc-esplora Aktivado de Amasoj


Komunumanoj surkampe faras rapidan mezuradon pri konsisto de grundo por pli racie sterki.





Aspergado

Komunumanoj faras mezuradon de grundo sub direktado de scienca laboranto.



Kadro kaj komunumanoj de Dongting-briga ekzamenas la rizplantidojn por pli bone ilin fle







Teknikistoj-kamparanoj mem faris fiinsekto-kaptilojn, kiuj ludas gravan rolon en prognozo pri fiinsekta plago.

La gubernio ĝenerale praktikas sistemon de tri rikoltoj en ĉiu jaro. Por ne prokrasti la transplan tadon de fruaj rizplantidoj oni ŝirmas per membrano rizplantidajn bedojn kontraŭ malvarmo







Agronomoj de komunumo ekspertizas altproduktajn speciojn de rizo.

Por kulturi agrikulturajn teknikistojn, komunumo starigis postlaboran agrikulturan universitaton.



Daĝaj-tipa Gubernio sur la Jangzi-rivera Delto


# Antaŭirantoj en Lerno de Daĝaj





Sekretario de Kianĝoŭ-komunumo kaj kadroj de la komunumo



La membroj de la gubernia partia komitato de Vuhi serioze studas verkojn de Prezidanto Maŭ por firme gvidi la popolon en konstruado de Daĝaj-tipa gubernio kun alta nivelo.









Gvidantoj de la gubernio ofte iras al bazaj unuoj por tie esplori industrian kaj agrikulturan produktadon.




*Maldekstre:* Partifilia sekretario de Joŭji-brigado kaj komunumanoj en semado

*Meze:* Sekretario de Fangkian-komunumo en ĉeloka kunveno pri transplantado de rizplantidoj.

*Dekstre:* Partifilia sekretario de Tangcaŭ-brigado kaj komunumaninoj en ŝprucigado de insekticido



La Elektro-kemia Fabriko



La traktoretoj produktitaj de la gubernio estas liveratoj ne nur al la gubernio sed ankaŭ al aliaj lokoj.



Daĝaj-tipa Gubernio sur la Jangzi-rivera Delto


# Sukcesoj de la Gubernia kaj Komunuma Industrio




Transformatoroj produktitaj de komunuma agrikulturila fabriko



La gubernia fera-ŝtala fabriko produktas por la fabrikoj de la gubernio, komunumoj kaj brigadoj grandan kvanton da ŝtalaĵoj.





Alttemperaturaj kaj altpremaj tinktur-maŝinoj pogrande produktataĵ de brigada agrikulturila fabriko

La aŭtomata produkta linio de krankoj mem farita de la fabriko de dizeloj






La fabriko de dizeloj subtenas la agrikulturan kaj flankokupan produktadon per motoroj.





Prove farita rizid-eltira maŝino





Plasta membrano por agrikulturo



Komputeraj partoj produktitaj de iu brigada fabriko

Motoroj produktitaj de komunuma elektromotora fabriko transportiĝas al uzantoj.






Granda kvanto da kemisterko transportata al komunumoj

# Pri la "Agrikultura Okpunkta Ĉarto"

EN la granda antaŭensalto de agrikultura produktado en 1958, Prezidanto Maŭ science resumis la riĉan sperton de la kamparanoj en pliproduktado kaj la atingojn en agronomia esplorado, kaj sisteme elmetis ok gravajn rimedojn por agrikultura pliproduktado, nome: grundo, sterko, akvo, semo, densa plantado, protektado, instrumentoj kaj mastrumado. Tiuj ok rimedoj estas populare konataj kiel la "Agrikultura Okpunkta Ĉarto". Ĝia ĉefa enhavo estas jena:

**Grundo:** Profunda plugado, plibonigo de grundo, ĝenerala enketado pri grundo kaj laŭplana racia uzado de tero.

**Sterko:** Racia sterkado laŭ la bezono de malsamaj grundoj kaj plantoj kaj malsamaj kreskaj periodoj de diversaj plantoj.

**Akvo:** Akvoutiliga konstruado, ĝustatempaj drenado kaj irigaciado kaj racia uzo de akvo.

**Semo:** Disvastigo de bonaj semoj.

**Densa plantado:** Racia densa plantado, alternigo kaj intersekvigo de malsamaj plantaĵoj por plene utiligi aeron, sunlumon kaj grundon kaj kreskigi plej multe da plantaĵoj en difinita areo.

**Protektado:** Plantoprotektado, preventado kaj ekstermado de fiinsektoj, plantmalsanoj, birdoj, bestoj kaj fiherboj por garantii normalan kreskadon de plantoj.

**Instrumentoj:** Reformo de agrikulturaj instrumentoj kaj efektivigo de meĥanizo de agrikulturo por altigi la laborproduktivon.

**Mastrumado:** Surkampa mastrumado.

Ĉiu el la ok rimedoj ludas apartan rolon en pliprodukto, kaj tamen ili interligiĝas kaj akcelas unu alian.

En la pasintaj pli ol dek jaroj, centoj da milionoj da kamparanoj kaj agronomiaj teknikistoj de nia lando serioze praktikis la "Okpunktan Ĉarton" kaj atingis rimarkindajn sukcesojn. Por altigi la kapablon kontraŭ naturaj katastrofoj, plibonigi la agrikulturajn produktajn kondiĉojn kaj konstrui kampojn de stabila alta produktado, multaj lokoj persiste kaj senlace reordigas montojn kaj akvojn kaj bonigadas grundon. La membroj de Daĝaj-brigado de Daĝaj-komunumo de Hijang-gubernio, Ŝanhi-provinco, komencis sian peneman konstruadon ekde "grundo", turnis la malfekundajn valojn kaj deklivojn en kampojn de stabila alta produkto nedamaĝeblajn de trosekeco kaj inundo, kaj la hektara produktokvanto de greno altiĝis de 750 kg. ĝis pli ol 7,500 kg. Kaj ĝi senĉese faris renovigon kaj progresadon kaj jam fariĝis lerninda ekzemplo por la kamparanoj de nia tuta lando. Ankaŭ Vuhi-gubernio, pri kiu ni raportas en tiu ĉi n-ro, plenumis la "Okpunktan Ĉarton" en la amasa movado de lerno de Daĝaj kaj rapidigis disvolviĝon de la produktado. Salaj-alkalaj kampoj kaj sableca dezertejo de multaj lokoj en norda Ĉinio kaj malfekundaj ruĝgrundaj kampoj en suda Ĉinio estas reformitaj en malsamaj gradoj. Grandaj kaj malgrandaj riveroj kiuj damaĝis agrikulturon per inundoj, estas senĉese ordigitaj kaj pli bone utiligataj. Ekzemple, Hajhe-rivero en norda Ĉinio estas unu el la famaj malutilaj riveroj en la ĉina historio. Inundo, sekegeco kaj salozo-alkalozo serioze damaĝis la vastan regionon de ĝia baseno, kaj la agrikultura produktado de tiu loko longe restis malalta. La vastaj amasoj de Hebej-provinco, Ŝandong-provinco, Pekino kaj Tiangin penlaboradis kaj faris sciencan reordigon al ĝi en 12 jaroj kaj turnis la malutilan riveron en utilan riveron. Samtempe kun la batalo kontraŭ inundo kaj salo-alkalo, oni fosis multajn putojn por irigacii per subtera akvo kaj tiamaniere multe ŝanĝis la postiĝintecon de malalta produktokvanto de agrikulturo en tiu regiono.

Sub la direktado de la "Okpunkta Ĉarto", vigle disvolviĝis amasaj agronomiaj eksperimentoj tra la kamparo de la tuta lando, kaj milionoj da kamparanoj partoprenas en tiuj aktivadoj. La agronomiaj grupoj de la popolaj komunumoj ofte faras eksperimentojn kaj esplorojn pri diversaj plantoj kaj dank' al ilia zorga eksperimentado, prova kulturado kaj disvastigado, nun la kultura areo de bonspecia rizo jam konsistigas ĉ. 80% de la totala areo de rizkampoj en suda Ĉinio; en norda Ĉinio rapide disvastiĝis bonaj specioj de tritiko, hibridigita sorgo kaj hibridigita maizo kaj rimarkinda pliprodukto estas atingita. Senĉese disvastiĝas ankaŭ la kulturaj sistemoj de tri rikoltoj en ĉiu jaro en suda Ĉinio kaj du rikoltoj en ĉiu jaro en norda Ĉinio kaj la sperto de alternigo kaj intersekvigo de malsamaj plantoj.

# Kurantaj Aferoj

## SUBTERA AKVOHERMETIKA ŜTONKAVERNA OLECISTERNO

En Ĉinio konstruiĝis la unua subtera akvohermetika ŝtonkaverna olecisterno. Tia olecisterno havas kompare grandan avantaĝon en tekniko kaj ekonomio, kaj ĝia funkciado havigis al nia lando novan vojon por grandmezure altigi la konservan povon de petrolo kaj petrolaj produktaĵoj.

## NOVA ARKEOLOGIA ELTROVO

Laborantoj de la Arkeologia Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj lastatempe trovis bone konservitan tombon de sklavmastra aristokrato en la ruinoj de Jin-dinastio apud Anjang de Henan-provinco. En la tombo konstruita ĉ. la unua duono de la 12-a jarcento a. K. troviĝas 200 bronzaĵoj kaj 400 jadaĵoj kaj ankaŭ ostaĵoj, eburaj skulptaĵoj, monkonkoj kaj aliaj objektoj, kiuj havas gravan sciencan valoron por studi la historion, politikon, ekonomion kaj kulturon de la sklava socio de nia lando.

Ĝi estas la plej kompleta el la jam eltrovitaj tomboj de sklavmastraj aristokratoj de Jin-dinastio. Sur kaj ĉirkaŭ la ĉerkujo sin trovas skeletoj de 16 sklavoj kruele mortigitaj. La ĉifoje elfositaj bronzaĵoj spegulas la altan teknikon de la laboranta popolo de Jin-dinastio en elfandado. Tre altan metiartan nivelon montras la jadaĵoj, inter kiuj la plej delikataj estas reliefaj kaj rondreliefaj figuroj.

## NOVA ALTTENSIA LINIO


Antaŭ nelonge instaliĝis alttensia linio servanta al la agrikultura produktado de Kinghaj-provinco en la supra baseno de la Flava Rivero. La linio komenciĝanta de la provinca ĉefurbo Hining kaj finiĝanta en la gubernio Gonghe de la Hajnan-a Tibetana Aŭtonoma Subprovinco longas je pli ol 150 kilometroj kaj provizis sin per tri transformatoraj stacioj.

La de ĝi trairata loko estas grava agrikultura regiono kun fekunda grundo, dense loĝata de la naciecoj tibeta, huj-a kaj han-a sur Kinghaj-altebenaĵo, kaj tie troviĝas Gujde, avangarda gubernio en lernado de Daĝaj en agrikulturo. La funkciado de tiu linio pluapaŝe akcelos la disvolviĝon de tieaj agrikulturo kaj paŝtado kaj ekspluatadon de akvaj riĉfontoj en la supra baseno de la Flava Rivero.


## LA TUTLANDA EKSPOZICIO DE BELARTAĴOJ EN PEKINO

La tutlanda Ekspozicio de Belartaĵoj de Ĉinio okazis en Pekino, de la 18-a de februaro ĝis la 17-a de aprilo. Ĝi karakteriziĝis per tio,

*Jada drako*



*Skeletoj de sklavoj dekapigitaj kaj dismembrigitaj apud porka skeleto (dekstre)*



ke oni per diversaj belartaj formoj entuziasme prikantas la brilajn meritojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ kaj la revolucian agadon de la saĝa gvidanto Prezidanto Hua.

Multaj verkoj temas precipe pri lerno de Daking en industrio kaj lerno de Daĝaj en agrikulturo, entuziasme prikantas la grandan kulturan revolucion kaj la socialismajn novajn aferojn kaj montras la novan spiritan fizionomion de la popolanoj, kaj krome iuj verkoj prezentas pitoreskajn pejzaĝojn de nia patrolando. Ĉifoje ekspoziciitaj estis 695 diversformaj belartajoj inkluzive de ĉinstilaj pentrajoj, olepentrajoj, gravurajoj, skulptajoj, karikaturoj, propagandaj bildoj, novjaraj bildoj, papertondajoj kaj rakontaj bildserioj.

Multaj el la montritaj karikaturoj prezentas profundan kaj akran enhavon. Ankaŭ la pentrado pri montoj, riveroj, floroj kaj birdoj, sufokitaj de la "kvarpersona bando", ricevis novan vivon.

Nova brilo estis aldonita al la ekspozicio per pentrajoj de belartistoj mongola, tibeta, ujgura, huj-a, manĉu-a, korea, ji-a, mjaŭ-a kaj aliaj.



*Lokomotivistino*

# Infana fervojo

de HONG JING

FAJFANTE helblua malgranda trajno por infanoj trapasas arbaron kaj poste eniras la stacion malrapide. Gaje elvagoniĝas grupo kaj grupo da elementlernejanoj kun ruĝa koltuko, infanoj de vartejoj mano-en-mane irantaj post la guvernistino, ankaŭ nepoj kondukataj de avoj kaj beboj tenataj de patrinoj en brakoj. Ili ĉiuj kontente finis sian plezuran "vojaĝon".

La infana fervojo kun du stacioj Pekino kaj Harbin estas instalita en parko de la urbo Harbin de Hejlonggiang-provinco de nia lando kaj longas je du kilometroj. La trajno kun 190 sidlokoj de ses malgrandaj vagonoj estas tirata per dizela lokomotivo kaj bezonas 13 minutojn por unufoja rondiro. De post sia ekfunkcio ĝi jam iris sekure pli ol 30,000 kilometrojn kaj veturigis 1,500,000 pasaĝerojn inkluzive de pli ol 10,000 fremdlandanoj de pli ol 80 landoj kaj regionoj.

La laboro de la infana fervojo estas aranĝita en imito al tiu de ordinara fervojo. Troviĝas sur la fervojo krom stacidomoj ankaŭ lumsignaliloj, semaforoj kaj aliaj instalaĵoj. Ĉiuj funkcioj de staciestroj, biletovendistoj, kontrolistoj de biletoj, fervojprotektantoj, trajnestroj, konduktoroj kaj lokomotivistoj estas plenumataj de bonaj lernantoj elektitaj el elementaj lernejoj.

La plej aĝa estas 13-jara kaj la plej juna 10-jara. Antaŭ sia eklaboro ili ricevas duonmonatan trejnadon de instruistoj kaj spertaj fervojistoj por ellerni administradon kaj sciojn pri dizela lokomotivo kaj ĝia manipulado.


La parko estas ne nur ludejo de infanoj, sed ankaŭ tereno amata de ili por lerni en postlecionaj horoj. Utiligante tiun eksterlernejan aktivadon la parko kaj lernejoj en kunagado kulturas infanojn, por ke ili amu fizikan laboron, timu nek malfacilojn, nek lacon kaj havu revolucian spiriton bone servi al la popolo.

12-jara lokomotivisto Meng Zajking estis lernanto de la kvina klaso de la elementa lernejo Huajuan. Kiam li komencis lerni stiradon de dizela lokomotivo, li sentis kaj ĝojon kaj timeton. Li ĝojis pro tio ke ellerninte la stiradon de lokomotivo li povos labori kiel lokomotivisto kiam li fariĝos plenaĝa viro por servi al la socialisma patrolando. Sed li ankaŭ timis okazon de akcidento dum stirado. Maljuna laboristo, kiu trejnadis lin, pacience instruis kaj kuraĝigis lin: "Por fariĝi bona daŭriganto de la revolucio kaj bone servi al la popolo, oni devas bone mastri teknikon." Helpate de la maljuna laboristo li notis en kajereto kaj ellernis parkere la nomon, funkcion kaj manipulan regularon de ĉiu maŝinparto de la lokomotivo kaj ripetade ekzercis sin pri starto, rapidŝanĝo, akcelo kaj bremsado. Post kelkaj semajnoj Meng Zajking jam fariĝis lerta malgranda lokomotivisto. Kiam li finplenumis sian unujaran servadon, li jam fariĝis "Majstro Meng", kiu elkulturis du metilernantojn.

Tamen, ne ĉiuj infanoj tiel bone traktas sian laboron kiel Majstro Meng. Tiuj kiuj laboras kiel konduktoro, biletkontrolisto kaj fervojprotektanto tamen ne tiel kontentas pri sia ofico. Pro tio la instruistoj ĉiam pacience edukas ilin por ke ili komprenu, ke estas pli grave por ili tie lerni bone servi al la popolo ol lerni teknikon.

Kiam Vang Hong-ju, 11-jara lernanto de la elementa lernejo Fuhua, estis elektita kiel malgranda fervojisto, li tiel ĝojis, ke li hejmenrevenis kantante kaj saltante por informi tion al la familianoj. Sed, kiam li estis instalita kiel

*La trajno veturigas malgrandajn pasaĝerojn de la stacio "Harbin" al la stacio "Pekino".*



fervojprotektanto, li malĝojis. Estis tute seninterese por li iradi sola sur la fervojo kunportante instrumentojn por protekti ĝin, dum la aliaj ĝoje laboris en la vagonaro. Li opiniis ke lia ofico estas multe malpli bona ol tiu de lokomotivisto kaj vagonara policano. Ĝuste kiam li estis en griza humoro, instruisto alproksimiĝis al li kaj kore interparolis kun li. La instruisto demandis lin, ĉu la trajno estus sekura, se najlo de la fervojo malfiksiĝus, kaj kia akcidento okazus.



*Haŭ Juĝuo vizitas malgrandajn laborantojn de la infana fervojo.*




*Malgrandaj pasaĝeroj*

se ŝpalo malboniĝus kaj ligna ŝtipo aŭ aliaj objektoj kuŝus sur la fervojo. La laboro de fervojprotektanto ja estas tre grava. Tuj poste la instruisto edukis lin per la spirito de Ĝang Side, laŭdata de Prezidanto Maŭ en sia verko «Servu al la Popolo». Vang Hong-ju pensis en si: Por fariĝi revoluciulo oni nepre devas kulturi en si de la infaneco la penson servi kiel bona ŝraŭbo de la revolucio. De tiam li serioze ekzamenis kune kun aliaj fervojprotektantoj, ĉiun relon, ĉiun ŝpalon kaj ĉiun relnajlon kunportante instrumentojn, kaj estis laŭdata de maljunaj laboristoj.

13-jara lokomotivistino Jang Ajhua estis la plej juna kaj iom dorlotata en la familio. Sed vidante, ke maljunaj laboristoj riparas la lokomotivon sub ĝi malgraŭ malpureco kaj laciĝo, ŝi eklaboris kiel ili. Dank' al diligenta lernado ŝi ellernis la teknikon de stirado. Ŝi neniam plendis pri malfaciloj kaj estis elektita kiel modela lokomotivistino.

En multaj jaroj, ili ne nur akiris multajn sciojn nericeveblajn en la lernejo, sed ankaŭ starigis en si bonajn kvalitojn de amo al la patrolando, al la popolo, al laboro, al sciencoj, protekto de komunaj posedajoj, observo de disciplinoj kaj solidareco kaj interhelpo. Forlasinte la fervojon iuj el ili daŭre lernis en meza lernejo, kaj poste en universitato. Nun multaj el ili jam iris en laborpostenojn. Haŭ Juĝuo, nun gvida kadro de la fervoja administracio de Harbin, estis unu el la unuaj lokomotivistoj de la infana fervojo. Nun li jam estas pli ol 30-jara, tamen li ofte rememoras sian interesan travivaĵon kaj la feliĉan vivon en la infaneco.




*Purigado de vagono*



*Legado de jurnalo*


# Nova Fizionomio de Akvolando









Arkoponto



Frua printempo



Kolektado de akvokaŝtanoj





Bela kamparo

# Himno al herooj

de **HE CUN**

KOMENCE de la sesdekaj jaroj, kiam Daking-anoj pene ekspluatis olekampon por solvi la petrolmankan malfacilon de la ŝtato, Ferulo Vang Ginhi diris kion la amasoj volis diri elkore: "Ni preferas redukti nian vivon je dudek jaroj, por nepre konstrui grandan olekampon!" Kaj en la sepdekaj jaroj, kiam la "kvarpersona bando" atakis Daking ke ĝia rapida disvolvo de la produktado estas praktiko de "teorio de produktaj fortoj" kaj

*Herooj de Daking*



agitis ĝiajn amasojn al ĉesigo de produktado, Daking-anoj ne aŭskultis al ili kaj elmetis la brilan devizon "estas glore labori energie por socialismo". Dum la pasintaj 17 jaroj, la Ferulo-tipa trupo de petrolistoj nutrita de Maŭzedongpenso ĉiam laboradis kiel mastroj, sub la gvido de la partia komitato de Daking, kontribuante sian saĝon kaj forton en konstruado kaj disvolvado de la olekampo.

Ĉisube ni prezentas al vi nur kelkajn reprezentantojn de miloj kaj miloj da herooj kaj modeloj de la olekampo.

## ŜTALA PUTOBORISTO VU KJUANKING

En novembro de 1973, arde iris la konstrua kampanjo por ekspluati novan olekampon de Daking. La du heroaj putoboraj taĉmentoj 1205 kaj 1202 konkursis kaj kreis novajn rekordojn senĉese.

*Teknikisto Vang Kimin (meze)*



Iun tagon, subite paneis la borstango de la 1202-a taĉmento. Aŭdinte la alvokon la malsana taĉmentestro Vu Kjuanking tuj ellitiĝis kaj kuris al la putoborejo por kune solvi la problemon. Pasis kelkaj horoj, sed la borilo ankoraŭ ne povis leviĝi aŭ turniĝi.

Estis profunda nokto. Starante sur la putobora platformo kaj fikse rigardante la sennombrajn lamplumojn de la olekampo Vu Kjuanking sentis kvazaŭ la tutlanda popolo rigardus lin per larĝe malfermitaj okuloj dirante: Rapidu, konstruu la novan olekampon rapide! Ĉe tio Vu Kjuanking tre maltrankviliĝis, kaj kunvokis urĝan kunvenon por trovi solvon. Pro manko de necesaj kondiĉoj li proponis apliki provizoran rimedon, sed li sciis laŭ sia dekjara putobora sperto, ke tiu rimedo estas danĝera. Por rapide ekspluati la novan olekampon li volontis riski la danĝeron.

Je la dua horo matene. Vu Kjuanking zorge kontrolis la preparan laboron kaj poste iris al la bremsostango. Juna laboristo Juan Ĝengkiang rapide kaptis la stangon antaŭ ol Vu povis tion fari kaj diris: "Taĉmentestro, mi estas deĵora skipestro, do mi manipulu la bremsostangon." Ankaŭ la juna vicestro de la taĉmento konkure klopodis por kapti al si la bremsostangon. Vu Kjuanking diris firmdecide: "Ne, estas danĝere!" Li admonis la kamaradojn iri al sekura loko kaj mem prenis la stangon.

Subite tondris, kaj la pendtenilo pli ol 100 kilogramojn peza flugis de sur la turnoplato, faligis Vu Kjuanking kaj ĵetiĝis pli ol 20 metrojn fore tra tri tavolojn da protekta veltuko de la platformo. La kamaradoj rapidis sur la platformon kaj vokis mal-

trankvile: "Taĉmentestro Vu!" La tuta korpo de Vu estis plena de sangmakuloj kaj li jam svenis.

Kuracistoj energie klopodis por lin savi. Post kvar tagoj li rekonsciiĝis. Grava kontuzo al la kapo preskaŭ perdigis al li la memorkapablon, tamen li demandis tre maltrankvile: "Ĉu iuj kamaradoj vundiĝis? Ĉu la paneo estas ĉesigita?" Kiam li informiĝis, ke la kamaradoj estas sekuraj kaj la drilmaŝino denove ekfunkciis, rideto montriĝis sur lia pala vizaĝo.



*Putoboristo Vu Kjuanking*

Kuŝante sur la lito Vu Kjuanking ekmemoris sian pli aĝan fraton. En la malnova socio, lia frato estis kaptita de japanaj agresantoj kaj devigita labori kiel kulio de karbominejo. Rokfalaĵo de galerio rompis al li la dekstran brakon kaj blindigis unu el liaj okuloj. Trovinte lin senutila la kapitalisto pelis lin el la karbominejo. Kaj li fariĝis almozpetanto. Kontraste kun tio Vu Kjuanking vivis en varma kolektivo kaj ĝuis prizorgon de la partia organizo. Tion pensante li larmis nereteneble kvankam li estas obstina homo.

Iom resaniĝinte Vu Kjuanking kun doloro ekzercis sin en levado de la brakoj tenante la litkadron por ke li povu daŭrigi sian putoboradon en estonteco. Tion vidinte la kuracistoj diris emocie: "Denove ni vidas en taĉmentestro Vu la heroan figuron de la Ferulo!"

Post sia malmobiliziĝo en 1960 Vu Kjuanking venis al Daking. En la konstruado de Daking li ĉiam kaj ĉie prenas la Ferulon kiel sian ekzemplon. En 1966, lia putobora taĉmento 1202 kaj la taĉmento 1205 gvidata de la Ferulo kune antaŭen marŝis ŝultro-ĉe-ŝultre kaj ili ambaŭ kreis rekordon de putoborado de centmil metroj en unu jaro, kiu superis tiaman avangardan nivelon de la mondo, kaj per tio gloris la patrolandon. En 1974, kiam la "kvarpersona bando" malice atakis Daking, li firme defendis la ruĝan flagon de Daking. Ĝuste en tiu jaro, lia taĉmento efektivigis antaŭdate je pli ol unu monato la planon, nome ĉiu membro de la taĉmento meznombre liveris al la ŝtato unu oleputon en unu jaro, kaj la totala profundeco de la putoj boritaj de ĝi en la tuta jaro superis tiun de 42 jaroj de la malnova Ĉinio kaj per tio refoje gloris Daking-olekampon. Ĉiufoje kiam oni pasigis festotagojn, li restis sur la produkta posteno. Iun Printempan Feston gvidanto sendis aŭton por venigi lin al lia familio pro urĝa afero. Li forlasis la putoborejon nur post kiam li finis enmetadon de ĉiuj borstangoj kaj klarigis la daŭrigotan laboron al la vicestro. Vu Kjuanking ja estas tia homo, kiu ĉiam amas sian laboron kaj tutanime klopodas por la bono de la kolektivo.

La bonaj faroj de Vu Kjuanking diskoniĝis tra la tuta olekampo. En 1974, la partia komitato de Daking gloris lin per la titoloj de modelo kaj "ŝtala putoboristo" de la olekampo.

En 1975 Vu Kjuanking ekfunkciis kiel konstanta membro de la partia komitato de la Putobora Komandejo de Daking kaj vicestro de ĝia revolucia komitato. Kvankam li ankoraŭ ne tute resaniĝis, tamen li ofte venis al la puto-

boraj taĉmentoj por enketi kaj solvi problemojn kaj partopreni en putoborado.

## PETROLKOLEKTISTINO HJU ŜUJING

Petrolkolektistino Hju Ŝujing kun du harplektaĵoj estis simpla kampara junulino kaj venis al Daking en vintro de 1966, kiam ŝi estis 17-jara. En septembro de 1970, ŝi estis asignita por fondi la unuan virinan petrolkolektan taĉmenton. Tiam la meznombra aĝo de la laboristinoj de tiu taĉmento estis nur 20 jaroj kaj al ili ĉiuj mankis sperto pri mastrumado de oleputoj. Iuj diris: "Ĉu tiaj senspertaj knabinoj, kiuj eĉ ne povas bone zorgi pri si mem, estas kompetentaj en la afero?" Timante nek mokridojn nek malfacilojn Hju Ŝujing kaj la kamaradinoj de la partia filio de la taĉmento ekfaris pioniran aferon sur la dezerta stepo kun la spirito de la Ferulo.

Nelonge post la fondiĝo de la taĉmento, iu nova oleputo devas esti ekfunkciigata, sed ĝiaj ekipaĵoj ankoraŭ ne estis alportitaj. Ĉu ili atendu sidante? Ĉe tio aperis antaŭ la okuloj de malgranda Hju la heroa figuro de la Ferulo kiu gvidis laboristojn por transporti ekipaĵojn ŝultre kaj mane en la komenca periodo de la konstrua kampanjo. Ŝi diris al siaj kamaradinoj: "Por senprokraste funkciigi la novan oleputon ni transportu la ekipaĵojn ŝultre!" Sub ŝia gvido la knabinoj unuanime transportis mane kaj ŝultre la ekipaĵojn al la putoborejo kaj rapide muntis ilin, tiel ke la nova oleputo ekfunkciis antaŭdate.

Iun fojon, en vaksopurigado ŝtala drato kun longeco de kelkcent metroj falis neatendite en la oleputon kaj oni dufoje provis eltiri ĝin, sed ne sukcesis, tial la oleputo ĉesis produkti. Por multe liveri petrolon al la ŝtato, la partia filio faris decidon en vintro de tiu jaro pri refunkciigo de tiu oleputo. La sturma grupo gvidata de Hju Ŝujing iniciate prenis sur sin tiun taskon. Dum eltirado de la drato malfunkcio de valvo kaŭzis senĉesan elŝprucadon de nafto, kaj malgranda Hju fariĝis "oleulo". Ŝi svenis de lacego kaj frosto. Post rekonsciiĝo la kolegoj admonis ŝin ripozi, sed ŝi diris: "La tasko ankoraŭ ne estas plenumita kaj la kamaradoj laboras daŭre, kiel mi povus foriri!" Tion dirinte ŝi denove eklaboris kune kun la aliaj. Post klopodado de tri diurnoj kaj unu tago, ili finfine malfermis la oleputon, kiu povas produkti kelkdek tunojn da nafto ĉiutage.

Hju Ŝujing ĉiam laboras atenteme kaj zorgeme laŭ la stilo de la Ferulo. Por garantii sekuran produktadon ŝi kontrolis per lupeo colo-post-cole la vaksopurigajn dratojn de la puta grupo kun totala longeco de pli ol 4,000 metroj en ĉiu trimestro kaj preterlasis neniun danĝeran punkton. Iun someron, pluvegis kelkajn tagojn kaj la kluzocisterno de iu oleputo estis plenigita de pluvakvo. Por aperigi ciferplaton instalitan en la kluzocisterno kaj garantii kompletan kaj ĝustan registradon de la ciferoj, malgranda Hju kaj la dejorantino kune ĉerpis pli ol mil sitelojn da akvo el la kluzocisterno.

Jam pasis pli ol sep jaroj. Hju Ŝujing progresis kune kun sia virina petrolkolekta taĉmento: tiu ordinara petrolkolektistino fariĝis taĉmentestrino, eminenta modelo de la tuta olekampo kaj vicsekretario de la partia komitato de petrolkolekta komandejo, kaj la petrolkolekta taĉmento gvidata de ŝi estas elektita kiel modela unuo de Daking-olekampo. Ili mastrumas 45 oleputojn kaj akvoenpumpajn putojn kaj ĉiujare superplenumis la produktan taskon de nafto; la kvanto de nafto liverita de ili al la ŝtato estas pli-ol-kvinoblo de la totala kvanto de nafto produktita en 42 jaroj en la malnova Ĉinio.

## VANG KIMIN, ANTAŬIRANTO SUR LA FRONTO DE SCIENCOJ KAJ TEKNIKOJ

En januaro la partia komitato de Daking okazigis grandan teknikan kunsidon por kolekti opiniojn pri tenado de alta kaj stabila produktado de la olekampo. En la kunsido teknikisto de la olekampo Vang Kimin flue paroladis du tagojn sen preparita teksto. Li parolis ĉion klare, ĉu pri la produkta historio aŭ pri la lasta stato de ekspluatado, ĉu pri dislokiĝo de la pe-

trolaj stratumoj aŭ pri ilia akvopenetriveco, ĉu pri la konservokvanto de nafto aŭ pri la petrolkolekto. Aŭskultinte ĉi tion la ĉeestantoj laŭdis lin.

Tio rezultis el longtempa persistado de Vang Kimin en kombiniĝo kun laboristoj kaj samtempa altigo de siaj politika konscio kaj teknika nivelo. Vang Kimin venis de la Pekina Petrola Instituto al Daking en la komenco de 1960, kiam li ankoraŭ ne diplomitiĝis, por partopreni en la konstrua kampanjo. Dum la pasintaj 17 jaroj li persiste laboris kune kun laboristoj pli ol 6 monatojn ĉiujare.

La jaro 1973 estis jam la dektria jaro post la komenco de la ekspluatado de Daking-olekampo. La plejmulto de la olekampoj en la mondo montris, ke ilia produktokvanto de nafto ĝenerale reduktiĝas jaron post jaro post ekspluatado de tri ĝis kvin jaroj. Ĉu Daking-olekampo povas teni altan kaj stabilan produktadon? Somere de tiu jaro Vang Kimin kun tiu problemo venis al la eksperimentejo de la unua petrolkolekta sekcio por prove krei altproduktan oleputon.

Tie troviĝas pli ol 130 oleputoj kaj akvoenpumpaj putoj, kiuj ĉiuj havas historion de pli ol dek jaroj en petrolkolektado. La eksperimento postulis, ke oni devas fari detalan enketon pri la historio kaj la nuna stato de ĉiu oleputo kaj ĉiu akvoenpumpa puto kaj sciencan analizon al pli ol 200 petrolaj stratumoj kun malsamaj dikeco kaj kvalito. Dek miloj da donitaĵoj kaj komplikaj rilatoj inter ili kaŭzis multegajn malfacilojn por solvi tiun problemon. Sed, sub la helpo de petrolkolektistoj, Vang Kimin kaj la eksperimenta grupo kune laboradis tage kaj nokte.

Por frue elfari altproduktan oleputon Vang Kimin vizitis kelkdek petrolkolektistojn kun riĉa praktika sperto, kaj en varma humida tendo li faris dekojn da desegnaĵoj pri la geologia strukturo de petrolaj stratumoj tage kaj nokte. En la eksperimentado Vang Kimin rompis la malnovan regulon de "petrolkolekto en sama rapideco" kaj racie pligrandigis la premforton al la oleputo kun dika oletavolo kaj bone kontaktanta kun akvoenpumpa puto por altigi la produktivecon. Tiamaniere la produktokvanto de nafto de la ses eksperimentaj oleputoj meznombre leviĝis kvaroble. Tiu ĉi sukcesa sperto estis tuj disvastigita tra la tuta olekampo, kaj oni rapide elfaris pli ol 200 altproduktajn oleputojn, kies produktokvanto konsistigas 20% de tiu de la tuta olekampo.



*Petrolkolektistino Hju Ŝujing*

Scienca esplorado estas senlima. En la komenco de 1976 Vang Kimin komencis novan eksperimentadon okcidente de la centra parto de Daking-olekampo. Plej frue komenciĝis la ekspluatado de tiu parto kaj pli ol duono de la elprenebla konservokvanto de nafto jam estis kolektita. Ĉu ĝi "kadukiĝis" kaj ne povas plu doni nafton stabile? Vang Kimin decidis analizi la trian puton kiun oni nomas "morta puto" por trovi rimedon rejunigi ĝin.

Por esplori la leĝon de movado de subteraj petrolo kaj akvo de la malnova olekampo Vang

Kimin konsultis multajn librojn pri similaj olekampoj, kaj por scii la staton de la produktaj oleputoj ĉirkaŭ la tria oleputo li konsultis ĉiun petrolkolektiston en lia hejmo, malgraŭ vento kaj neĝo. Post tia enketado li konkludis: kvankam la ĉefa olestratumo duone dronas en akvo, tamen aliaj olestratumoj kun malbona akvopenetriveco ludos stafete sian rolon anstataŭ la ĉefa olestratumo kaj tiel efektiviĝos stabila produktado se oni plifortigos la enpumpadon de akvo kaj pligrandigos la premforton al ĝi.

Li faris projektadon kune kun laboristoj kaj dufoje eksperimentis pri fortigo de akvoenpumpado al la tria oleputo, kaj dank' al la klopodo ĝia produktokvanto rekte leviĝis de 9 tunoj ĝis 31 tunoj. Vang Kimin tamen ne kontentiĝis je tio. Pensante pri la instruo de Prezidanto Maŭ **"Praktiko, konado, denove praktiko, kaj denove konado — tia formo cirkulade ripetiĝas senfine"**, li daŭrigis la analizon kaj esploron kaj, laŭ sia plua kono, elmetis la proponon ke oni kolektu petrolon per du tuboj en la tria puto. Kaj sekve la produktokvanto de la tria puto altiĝis de 31 tunoj ĝis pli ol 50 tunoj, t.e. sesoblo de la antaŭa.

Sukcesis la eksperimento. La tiel nomata "kaduka regiono" denove komencis multe elŝprucigi nafton kaj ĝia produktokvanto estas stabila. Tiu grava sukceso liveris al la tuta Daking-olekampo sciencan bazon por ke ĝi longtempe produktu alte kaj stabile.




### TERKAVOJ DE OFERITAJ SKLAVOJ

Somere de la lasta jaro arkeologoj de Ĉinio eltrovis ĉe fame konata granda tombejo de Vuguanvilaĝo de Henan-provinco ĉ. 200 terkavojn faritajn de sklavmastroj de Jin-dinastio por oferi grandan nombron da sklavoj al mortintoj. Ili servas al ni kiel grava historia atestaĵo de la krima sklavsistemo por studi la politikan staton de la sklava socio de nia lando, kaj ankaŭ estas viveca materialo por fari klasbatalan edukadon.

En Jin-dinastio la sklavmastroj ofte mortigis grandan nombron da sklavoj kiel oferaĵon al mortintaj aristokratoj aŭ al iliaj prapatroj. En la jam trovitaj 200 terkavoj enteriĝis pli ol 1,000 sklavoj, kiuj plejparte estis dekapigitaj. Laŭ unuapaŝa kalkulado, en la 250 terkavoj eltrovitaj per geologia borado estis skeletoj de 2,000 sklavoj.

Kun la nombrego da skeletoj de sklavoj forte kontrastas la reĝa tombo kun granda nombro da valoregaj objektoj. Tio estas forta atesto de la tiamaj kruela klasa subpremado kaj akra klasa antagonismo.

### DU NOVAJ AEROLINIOJ

La du nove malfermitaj aerolinioj Ŝanhajo-Langoŭ-Urumĉi kaj Ŝanhajo-Hangĝoŭ-Ĉangŝa-Gujlin lastatempe sukcesis en provado kaj jam ekfunkciis.


La Ŝanhajo - Lanĝoŭ - Urumĉi-a aerolinio kun longeco de 3,600 kilometroj estas nuntempe la plej longa en nia lando.

### FRUKTO EN STUDADO PRI LA TEORIO DE FUNKCIO


En sia studado de la teorio de funkcioj, laborantoj de la Matematika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj unuafoje trovis organikan rilaton inter la du ĉefaj konceptoj — "deficita valoro" kaj "stranga direkto" en la studo pri valordistribua teorio. La rezulto de ilia studo pri la du konceptoj jam atingis avangardan nivelon de la mondo, antaŭenpuŝis la disvolviĝon de la teorio de funkcioj kaj estas alte taksita de la matematikaj rondoj en- kaj ekster-landaj.

# Nova Fizionomio de Montregiono

Li- kaj mjaŭ-naciecaj komunumanoj kolektas kaŭĉukon



La li-, mjaŭ- kaj han-naciecaj kadroj kaj komunumanoj de Kionggong-gubernio de Guangdong-provinco en Vuĝiŝan-montaro de nia Hajnan-insulo unuanime disvolvis la amasan movadon de lerno de Daĝaj en agrikulturo kaj multe ŝanĝis la fizionomion de la montregiono. Ĝia produktokvanto de greno kreskis duoble kompare kun tiu antaŭ la granda kultura revolucio.




Pumpstacio nove konstruita.




Li-nacieca junulino Vang Kajmej (dekstre), vicsekretario de la komunuma partia komitato, profundiĝis en vilaĝojn por propagandi la fundamentan linion de la Partio.

# Esplorado pri Marproduktaĵoj de Ĉinio



La sciencistoj de la Oceanografia Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj iris al fiŝvilaĝoj, fabrikoj, surmaraj kulturaj regionoj kaj kulturejoj de marproduktaĵoj por tie organizi esploran grupon kun partopreno de baznivelaj kadroj, laboristoj kaj fiŝistoj, aktive disvolvis sciencesploradon en kombino kun produktado kaj faris kontribuon al ekspluato de oceana riĉfonto de nia lando.




Riĉa rikolto de frue maturiĝa rizo

Sciencistoj rigardas kun kadroj kaj laboristoj kreskon de mituloj en bredejo.



Sciencistoj kaj laboristoj kune observas kreskon de hipokampoj.





Kolektado de specimenoj de planktonoj sur maro

# Novaj paŝoj de fiŝbreda brigado

Stimulate de la Dua Tutlanda Konferenco pri Lerno de Daĝaj en Agrikulturo, la fiŝbreda brigado de la popola komunumo Helie de la urbo Vuhi de Giangsu-provinco faris planon por fosi novajn kaj reformi malnovajn fiŝbasenojn por akiri altan produktokvanton. Ĝi vastigis, profundigis kaj normigis 370 fiŝbasenojn, kaj nove fosis 40 hektarojn da fiŝbasenoj. La brigado rapidigas meĥanizadon per siaj propraj fortoj kaj senĉese altigas la sciencan nivelon de sia bredado. Nun ĉiu hektaro de ĝiaj basenoj liveras pli ol 11 tunojn da fiŝoj. En la lastaj du jaroj la brigado resumis kaj disvastigis bonan sperton pri bredo de fiŝidoj inter maturaj fiŝoj, pri miksa bredo de diversaj fiŝoj en sama akvo, pri plibonigo de kvalito de akvo, ktp. La brigado plene utiligas siajn akvojn, mallongigas la periodon de bredado kaj garantias regulan liveron de fiŝoj al urboj en somero, aŭtuno kaj vintro.

Panoramo de fiŝbasenoj de la brigado






Teknikisto kaj komunumanoj en scienca esplorado

Riĉa rikolto de fiŝoj



Vintruma baseno de alvuso




# La agrikulturila industrio de Ŝigiaĝuang-subprovinco


En la lastaj jaroj, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **"La fundamenta elirejo de agrikulturo estas meĥanizo"**, la subprovinco Ŝigiaĝuang de Hebej-provinco de nia lando aktive disvolvis lokajn malgrandajn industriajn entreprenojn servantajn al agrikulturo. Dank' al tio, la drenado, irigaciado, draŝado kaj prilaborado de agrikulturaj produktajoj de la subprovinco estas fundamente meĥanizataj aŭ duonmeĥanizataj.



Tritikaj semmaŝinoj produktitaj de riparejo de agrikulturaj maŝinoj de iu komunumo

Dizeloj produktitaj de gubernia fabriko de agrikulturaj maŝinoj





Pumpstacio nove konstruita de iu komunumo

Malgranda falĉmaŝino ekuziĝas.



# Pri la moderna dramo "La Longa Marŝo"

Ĉe la pramejo Vangniangtan






Kora aklamado pro la granda venko de Zunji-kunveno




Li Joŭguo redonas la glavon kaj fusilon al la suba ĉefo de ji-nacieco.





Manovrado por ekstermi malamikojn

Transgrimpo de neĝkovrita monto





Trapaso de marĉa herbejo

Venka kuniĝo de la trupoj de la Ruĝa Armeo



# Vizito al la Ekspozicio pri Lerno de Daking en Industrio


de HIAŬ HJUEŜENG

EN la komenco de junio ni vizitis la "Tutlandan Ekspozicion pri Lerno de Daking en Industrio" en Pekino. Ĝi estas senprecedence grandioza ekspozicio pri industrio de nia lando. La Ekspozicio prezentas krom la faroj de Daking, ankaŭ 76 avangardajn entreprenojn el 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta lando.

En la centra halo nin interesis granda elektrizita modelo de Daking. Sur la spaco de centoj da kvadrataj kilometroj troviĝas sennombraj petrolputoj, ŝaktoskafaldoj, petrolaj cisternoj, oletubaj linioj, altaj petrolrafinaj turoj kaj verdaj kampoj punktitaj de laboristaj vilaĝoj. Jen estas la olekampo Daking — lernenda ekzemplo, de kiu Prezidanto Maŭ Zedong alvokis, en 1964, la tutan industrion de nia lando lerni.

Antaŭ 17 jaroj Daking estis stepo en dormo. Nun ĉi tie la Daking-anoj jam konstruis grandan petrolkampon kun avangarda nivelo de la mondo kaj unuapaŝe modernan petrolkemian uzinon en kombino de industrio kun agrikulturo kaj de urbo kun kamparo.

*La modelo de Daking-olekampo*





*Modelo de ilmaŝino mem projektita kaj fabrikita de la Dalian-a Lokomotiva Fabriko*

Kiel oni akiris tiujn ĝojigajn sukcesojn? Pri tio respondas la granda kvanto da bildoj, modeloj, objektoj, grafikaĵoj kaj filmoj en la ekspozicia halo "Daking": Dank' al studo de verkoj de Prezidanto Maŭ, la Daking-anoj ekhavis klaran direkton kaj akiris neelĉerpeblan forton kaj altan entuziasmon por la revolucio kaj seriozan kaj zorgeman laborstilon. Kun tiu revolucia spirito la Daking-anoj venkis sennombrajn malfacilojn, elhakis tute novan vojon por la disvolviĝo de industrio de nia lando kaj faras pli kaj pli grandan kontribuon por la socialisma patrolando.

Pli ĝojinde estas, ke post pluraj bataloj kontraŭ reviziisma linio en la kultura revolucio, la spirito de Daking pli kaj pli disvastiĝis tra la tuta lando, pli bone disvolviĝas la amasa movado de lerno de Daking, kaj en la diversaj profesioj aperis multnombraj Daking-tipaj entreprenoj kaj personoj kia Ferulo Vang Ginhi.

En iu halo de la Ekspozicio klarigisto rakontis al ni la faron de la Hangĝoŭ-a Fabriko de Dentradoara Skatolo de Ĝegiang-provinco.

La fabriko produktas la unua en nia lando porŝipan dentradoaran skatolon. Depost la ekfunkcio de la fabriko en 1965 ĝia produktado senĉese progresas. En la lastaj 9 sinsekvaj jaroj ĝi ĉiujare superplenumis la taskon asignitan de la ŝtato kaj la produktokvanto estas duoblo de tiu laŭ la antaŭa projekto.

La "kvarpersona bando" senĉese ĝenadis la laboron de Ĝegiang-provinco, sed tiu ĉi fabriko akiris grandan sukceson en produktado. Tio estas tre respektinda. La "kvarpersona bando" energie malhelpis la industriajn entreprenojn lerni de Daking. Ili ĉiamaniere klopodis por malordigi socialismajn entreprenojn kaj fuŝi la nacian ekonomion, kun la vana espero uzurpi la ŝtatan gvidon kaj restaŭri kapitalismon. Iu fidela sekvanto de la "kvarpersona bando" en Ĝegiang kalumniis la fabrikon, persiste irantan la vojon de Daking kaj entuziasme konstruantan socialismon, ke ĝi "produktas serve al la erara linio" kaj plurfoje agitis laboristojn ĉesigi produktadon.

La partia komitato de la fabriko alvokis la tutan personaron diskuti pri la diro. Iuj laboristoj diris: "Niaj produktaĵoj estas vaste uzataj tra la lando de Usuri-rivero ĝis Hiŝa-insularo, kaj kiel oni povas diri, ke ni 'produktas serve al la erara linio'?" Aliaj diris: "Konstruado de socialismo dependas de penlaborado. Bone diris la Daking-anoj: Neniofarado tute ne konformas al marksismo."

Post diskutado la kadroj kaj laboristoj pli bone vidas, kio estas erara linio kaj kio prava. Ili fariĝis pli firmaj en lernado de Daking. En la bildoj montritaj ni vidis: En la sezono de fiŝkaptado laboristoj iris kun instrumentoj kaj maŝinpartoj al apudmaraj regionoj por ripari

dentradoaran skatolon en fiŝŝipoj; kiam okazis forta tertremo en Tangŝan kaj tie oni urĝe bezonis dentradoarajn skatolojn, la laboristoj senpage kromlaboris kaj ĝustatempe elfaris kaj liveris la bezonatajn produktaĵojn. . .

Ĉe la montrostablo pri la Ĉangling-a Petrolrafinejo de Hunan-provinco klarigisto projekciis por ni lumbildojn pri la reguloj pri administrado de la fabriko ellaboritaj de laboristoj en lerno de Daking. Tio estis sukceso gajnita de la partia komitato kaj laboristoj post refuto al la absurdaĵo de la "kvarpersona bando", ke reguloj kaj disciplinoj estas ĝeno, ĉikano kaj subpremo al la laboristoj.

En iu foto ni vidis, ke kelkaj junaj laboristinoj absorbite kontrolas oleajn pumpilojn. Klarigisto diris, ke ili estas unu el la avangardaj grupoj de la fabriko. Tage kaj nokte la 8 junulinoj de ĝi alterne prizorgas 70 altpremajn pumpilojn. La pumpiloj estas instalitaj senŝirme sub la ĉielo kaj la laboro de la junulinoj estas tre peniga. Sed en la pasintaj 6 jaroj depost la ekfunkcio de la fabriko, ĉu en frosto aŭ sub la bakanta suno, ĉu en tago aŭ nokto, ili ĉiam diligente laboris ĉe la pumpiloj, ĉiutage faris 760 registrojn de donitaĵoj, brile viŝis ĉiujn pumpilojn kaj en la tuta pumpejo oni povas trovi neniun olemakulon kaj la produktado ĉiam iras sekure. Ilia laborloko estas honore nomita "perfekta posteno". La tuta fabriko havas 101 tiajn postenojn. Administrado de fabriko per la laboristoj multe stimulis la laboristojn, kaj dank' al tio en la fabriko aperis viveca kaj vigla politika situacio, la produktado pli kaj pli progresas, kaj la memkosto de produktaĵoj senĉese reduktiĝas.

Ĉiu tipa entrepreno prezentata en la ekspozicio faris batalon kontraŭ reviziisma linio. Oni diris ke batali kontraŭ reviziisma linio estas la plej valora parto de la spirito de Daking. Oni povas teni la direkton de socialisma entrepreno, nur se oni lernas tion de la Daking-anoj.

Lerni de Daking la spiriton de penema luktado kontraŭ malfaciloj estas alia evidenta karaktero de multaj tipaj entreprenoj eksponataj en la halo.

En profundaj montoj de sudokcidenta Ĉinio estas granda karbominejo Baŭding. En la komenco de konstruado de la minejo la pioniroj tranoktis en bambuaj kabanoj kaj devis trinki el montvalo. Sed ili rigardis tion gloro kaj laboris tre pene. Fine en 6 jaroj ili konstruis gravan karbominejon de nia lando, farante kontribuon por ŝanĝi la dislokiĝon de karbominejoj de nia lando.

*Salejo nove konstruita*




En la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de nia lando estas mikroonda relajsa stacio de Hinghinghia, kie laboras 5 personoj. Ili multjare laboris profunde en dezerta gobio. Ili zorgeme flegadis la ekipaĵojn kaj kreis rekordon de seninterrompa telekomuniko en 13 jaroj. Tial la stacio estas honorita per la titolo "Daking-a Floro sur Gobio".

La maristoj de la cisternŝipo "Daking 16" de Ŝanhajo ofte mem riparis multajn relative grandajn maŝinpartojn de la ŝipo dum navigado por malmultigi la tempon de riparado en doko. Dank' al ilia konscienca laborado la kaduka cisternŝipo sekure navigis en 11 jaroj 550,000 marmejlojn kaj ĉiujare superplenumis la transportan taskon de petrolo.

Ni venis al la modelo de Bejmu-salejo ĉirkaŭata de multaj rigardantoj, kaj ĉe la modelo klarigisto, kiu mem estas laboranto de la salejo, rakontis al ni la heroan faron de laboristoj de la salejo.

Bejmu-salejo situas ĉe Bakbo-golfo en suda Ĉinio. En 1968 laboristoj de la salejo proponis konstrui digojn por krei novajn salsunumajn basenojn. En la unua periodo de konstruado oni devis fari 68 hektarojn da poldero. Por tio estis fondita la poldera taĉmento el 74 salsunumaj laboristoj. Pro malmulteco de personoj ili laboris multe pli energie ol antaŭe. Ne havante maŝinojn ili klopodadis per simplaj instrumentoj kaj portovekto kaj korbo. Ili diris: "Se la Daking-anoj konstruis sur la dezerto grandan olekampon per siaj propraj fortoj, ja ankaŭ ni povos krei novajn salsunumajn basenojn."

*Avangarda grupo de la Ĉangling-a Petrolrafinejo*




Ili frontis grandajn malfacilojn. Tero, kiun laboristoj alportis, ofte estis forportita de tajfuno kaj tajdo. Sed la laboristoj firme kredis, ke homa volo certe venkos la naturon. Sub la gvido de la partia komitato, ili laboradis kaj en pluvo kaj en nokto, se nur tajdo forflusis. En 20 monatoj ĉiu laboristo transportis meznombre 176,000 korbojn da terajo kaj 225 kubmetrojn da ŝtono. Fine ili faris dikan digon kun longo de 2,170 metroj kaj kreis la unuajn novajn salsunumajn basenojn. Poste ili finis la taskon de la dua periodo de konstruado de pli vastaj basenoj.

Aŭskultante la rakonton de la klarigisto, rigardante la fotojn pri la tiama polderigado kaj palpante la vektojn kaj korbojn uzitajn de salfaristoj, oni profunde sentis, ke la ĉinaj laboristoj armitaj per progresa penso povas transloki monton kaj plenigi maron.

La Dalian-a Lokomotiva Fabriko havas la aĝon de 76 jaroj, kaj ĝi akiris grandajn sukcesojn en lerno de Daking. Ĝia dizela lokomotivo "Dongfeng 4" estas eksponata sur placo de la ekspoziciejo. Tia lokomotivo de 4,000 ĉevalpovoj atingis la avangardan nivelon de la sepdekaj jaroj kaj estas uzata sur nia fervojo.

Antaŭ la Liberiĝo Ĉinio ne havis industrion de lokomotivo kaj sur la fervojoj kuris vaporlokomotivoj importitaj el diversaj imperiismaj landoj. Kaj la nomita fabriko estis nur riparejo. Post la Liberiĝo la fabriko komencis produkti vaporlokomotivojn kaj dizelan lokomotivon de malmultaj ĉevalpovoj. Antaŭ kelkaj jaroj, kiam la ŝtato asignis al ĝi la taskon fabriki dizelan lokomotivon de 4,000 ĉevalpovoj, la fabriko ankoraŭ ne havis sufiĉan kondiĉon por tion plenumi. Iuj diris: "Kiel alta estas etaĝo, tiel alta devas esti la ŝtuparo. Per kadukaj ekipaĵoj de la dudekaj jaroj oni ne povas produkti ion kun nivelo de la sepdekaj jaroj." Sed la partia komitato kaj plejparto de la laboristoj opiniis, ke ili devas agi kiel la Daking-anoj, "entrepreni, se estas necesaj kondiĉoj; kaj ankaŭ entrepreni kreinte necesajn kondiĉojn, se tiuj

ne ekzistas", malnova fabriko havas multajn veteranajn laboristojn, kiuj havas altan politikan konscion kaj multan teknikan scion. Se oni plene utiligos ilian saĝon kaj forton, oni certe povos longigi kaj eĉ krei ŝtuparon por surgrimpi altajn etaĝojn.

Laboristoj de la dua mekanika sekcio transformis malnovan fremdlandan tornilon produktitan en 1912 en hidraŭlikan duonaŭtomatan maŝinon kun 7 subteniloj kaj 17 tranĉiloj. La partia komitato de la fabriko laŭdis kaj propagandis ilian faron kaj alvokis la tutan fabrikon lerni de ili. Sekve de tio en la fabriko leviĝis nova tajdo de amasa teknika renovigo. Nun la malnova fabriko aspektas kun tute nova fizionomio kaj du jarojn antaŭdate komencis produkti dizelan lokomotivon de 4,000 ĉevalpovoj.

En la ekspozicio oni admiras kaj respektas ankaŭ la heroajn farojn de aliaj lokoj: Kajluan-karbominejo, grave detruita de la forta tertremo en la pasinta jaro kaj nun rapide restariganta sian produktadon; la urbo Ĉangĝoŭ de Giangsu-provinco kaj la gubernio Zunhua de Hebej-provinco, aktive multigantaj mezajn kaj malgrandajn industriajn entreprenojn kaj subtenantaj agrikulturon; la Pekina Ŝigingŝan-a Ŝtala Fabriko, alte produktanta en 8 sinsekvaj jaroj; la Maŝinfabriko Gianhua de Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, kiu trarompis la blokadon kaj monopolon de la sovetunia reviziisma renegata kliko kaj sukcesis fondiĝi per siaj propraj fortoj; la transporta grupo de Vang Gjunŝaŭ de Gongĉangling-ferminejo de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio; la Fiŝkompanio de Jantaj de Ŝandong-provinco; la Tiangin-a Esplora kaj Projekta Instituto de Elektra Transmisio k. a.

Ni pririgardis multajn montrostablojn kun modeloj de Daking-tipaj entreprenoj kaj estis forte stimulitaj de la heroaj faroj. La ekspozicio montras: La granda alvoko de Prezidanto Maŭ **"lernu de Daking en industrio"** jam naskis profundan influon al nia vastega lando. Nun pli vaste kaj pli profunde disvolviĝas la amasa movado de plimultigo de Daking-tipaj entreprenoj. Estas antaŭvideble, ke en la nemalproksima estonteco, Daking faros novan pli grandan kontribuon kaj aperos certe pli multaj Daking-tipaj entreprenoj en ĉiuj provincoj, municipoj, aŭtonomaj regionoj, kaj cetere aperos ankaŭ Daking-tipaj industriaj branĉoj kaj Daking-tipaj urboj.

# Kreskado de kvin georfoj

ANTAŬ 15 jaroj, kvin gefratoj en laborista familio de Ĉongven-distrikto de Pekino perdis la gepatrojn kiuj mortis unu post la alia pro malsano. La plej aĝa el ili estis dekkvinjara kaj la plej juna nur trijara. Tiam la respondeculo de la kvartala administrejo komisiis Onklinon Tian loĝantan en la sama korto varti ilin per ŝtata subvencio. La georfoj ricevis ĉiuflankan helpon de amasoj kaj koran prizorgon de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ. Nun, la kvin georfoj jam plenkreskiĝis. La plej aĝa Ĝoŭ Tongŝan fariĝis vicsekretario de la partia komitato de la Elektroproviza Buroo de Pekino, la dua Ĝoŭ Tongking fariĝis teknikistino de la Pekina Levmaŝina Fabriko, la tria Ĝoŭ Tonglaj plotonestro de iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, la kvara Ĝoŭ Tonghe tradukistino de la Esplora Instituto de Laborsekurigo de Pekino post diplomitiĝo en universitato, kaj la kvina Ĝoŭ Tongji post diplomitiĝo en gimnazio ĉijare iris fiksloĝi en antaŭurba popola komunumo de Pekino.

Lastatempe ni vizitis ilian hejmon kaj intervjuis Tongŝan, Tongking kaj Tonghe. Ili montris al ni malnovan foton kaj rakontis al ni ilian feliĉan historion.

Antaŭvespere de la Unua de Junio, 1964, kun senlima amo kaj dankemo al la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ ili skribis leteron, kaj kune kun ĝi sendis sian foton al Prezidanto Maŭ por raporti al li siajn lernadon kaj vivon. Je la dua




*La kvin gefratoj antaŭ 13 jaroj*

de junio, ili ricevis respondan leteron skribitan de la Kancelario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio laŭ la komisio de Prezidanto Maŭ. Oni skribis interalie: "...kvankam vi perdis viajn gepatrojn, sed pli multe da gepatroj kaj geonkloj en la tuta lando vin prizorgas, tial vi povas feliĉe vivi kaj sane kreskadi. Tio estas neimagebla por la infanoj en la malnova socio, en la nuna Tajvan-provinco kaj en la kapitalisma socio. Ni esperas ke vi bone utiligos la feliĉan infanaĝon, diligente lernos kaj fortigos vian sanon per ekzercado por bone servi al la socialisma konstruado en la estonteco kaj ne vanigi la prizorgon kaj esperon de la tutlanda popolo al vi." Larmadis la kvin gefratoj pro emociiĝo.

La 17-an de aŭgusto de tiu jaro, ili estis invititaj ĉeesti amuzan kunvenon kun fremdlandaj gastoj kaj infanoj. Rigardante tion kiel komunan feliĉon, la najbaraj geonkloj ĝoje kombis al ili la harojn kaj lavis al ili la vizaĝon, kaj la kvinjara Tongji eksaltis pro ĝojo.

Kiel neforgesebla estas la tago. Kiam la kvin gefratoj venis al la Popola Halo, Tongŝan, la plej aĝa el ili eklarmis pro ekscitiĝo kaj liaj okuloj estis vualitaj. Li pensis: En la malnova socio, la patro estis rikiŝotiristo kaj la patrino rubkolektistino kaj la tuta familio baraktis en mizero. La du pli aĝaj fratinoj mortis de malsano pro manko de mono por kuraco. La gepatroj povis nur ploregi, sed kiu povis savi ilin el la abismo! En la nova socio, ni kaj aliaj orfoj, kiuj perdis siajn gepatrojn pro naturaj katastrofoj aŭ malsano, ricevis prizorgon de la tutlanda popolo kaj la Partio. Kiel granda estas la diferenco inter la nova kaj la malnova socioj. Tiam ili kaj aliaj kamaradoj atendantaj la fremdlandajn amikojn kune laŭte kantis la kanton «Bona Estas la Socialismo», kaj Tongking kantis en la nomo de la kvin gefratoj «Popolkanton Mi Prezentu al la Partio». Iom poste, Kamaradino Deng Jingĉaŭ venis kaj levis Tongji en siajn brakojn kaj senĉese kisis lin. Ŝi prenis la manojn de Tongŝan, Tongking kaj Tonghe kaj diris: "Prezidanto Maŭ tre zorgas vin, Ĉefministro Ĝoŭ komisiis al mi, ke mi transdonu lian saluton al vi." Tongŝan estis tiel ekscitita kvazaŭ lia koro tuj elsaltus el la gorĝo, kaj el la koro plenplena de vortoj li diris: "Ni kvin georfoj salutas Prezidanton Maŭ kaj Ĉefministron Ĝoŭ!" Kaj Ka-

*Ĝoŭ Tonglaj (dekstre) estas plotonestro de ĈPLA.*



*Ĝoŭ Tonghe kritikas, kune kun siaj kamaradoj, krimojn de la "kvarpersona bando".*



maradino Deng Jingĉaŭ demandis: "Kiel vi vivas? Ĉu vi havas malfacilojn?" La geknaboj respondis: "Ni ne havas malfacilon kaj ni vivas tre bone!" La naiva malgranda Tongji interrompis: "Bonega estas la infanĝardeno! Tre bongustaj estas la manĝaĵoj faritaj de la onklinoj!" Ekridis ĉiuj, ankaŭ Kamaradino Deng Jingĉaŭ ekridis. . .

Post la fino de la amuza kunveno, Kamaradino Deng Jingĉaŭ refoje venis al la kvin gefratoj kaj intime admonis ilin: "Diligente lernu kaj bone laboru; ne vanigu la esperon de la tutlanda popolo al vi!" Tiuj vortoj ĉiam kuraĝigas ilin bone lerni kaj labori.

Antaŭvespere de la Printempa Festo de la jaro 1965, la plej aĝa Ĝoŭ Tongŝan aliĝis al ĈPLA. En kunveno por konsoli familianojn de armeanoj kaj martiroj en la Printempa Festo de tiu jaro, Ĉefministro Ĝoŭ venis al Onklino Tian kaj zorgeme demandis al ŝi kiel vivas la kvin gefratoj. Onklino Tian, kiu multe suferis en la malnova socio kaj plenas je revolucia entuziasmo al la kvin gefratoj, respondis: "Tre bone, tre bone! Trankviliĝu, Ĉefministro Ĝoŭ," kaj ŝi pensis en si: Mi nepre faros la geknabojn daŭrigantoj de la socialisma revolucio.

Rapide pasis la tempo. La kvin gefratoj grandiĝis kaj fariĝis vigleeplenaj revoluciaj junuloj.

En la jaro 1976, Ĉefministro Ĝoŭ kaj Prezidanto Maŭ forlasis la mondon unu post la alia. Kun grandega malĝojo la kvin gefratoj skribis al estimata Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ por esprimi sian senliman sopiron al Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ kaj sian firman decidon daŭrigi la revolucion strikte sekvante la saĝan gvidanton Prezidanton Hua. Ili skribis interalie: "Ni plej ŝatas kanti 'Popolkanton mi prezentu al la Partio. Mi prenas la Partion kiel mian patrinon. La patrino donis al mi nur la korpon, sed la brilo de l' Parti' lumigas mian koron!'. Tiu popolkanto esprimas la penson kaj senton de ni kvin gefratoj. Ni profunde sentas, ke nur en la socialisma patrolando ni georfoj povas vivi feliĉe. Ni decidis turni la malĝojon en forton, daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ kaj konduki ĝisfine la proletan revolucian aferon komencitan de li, kaj kontribui nian forton por efektivigi la grandiozan celon de modernigo de industrio, agrikulturo, nacidefendo, scienco kaj tekniko."

*Ĝoŭ Tongŝan kaj liaj kamaradoj kune kritikas la "kvarpersonan bandon" per dazibaŭoj.*



*Ĝoŭ Tongji (dekstre)*



*Ĝoŭ Tongking (dekstre) kaj maljuna laboristo kune projektas.*



# Bonvenon al amikaj artistoj eksterlandaj

de **JOŬ JANG**

EN la lastaj monatoj, la ĉina popolo akceptis ensemblojn kaj muzikistojn el Rumanio, Japanio, Jugoslavio, Kanado, la Okcidenta Germanio kaj Norvegio, kies majstra prezentado forte impresis la ĉinajn spektantojn. Ilia amika vizito al nia lando ludis aktivan rolon en akcelado de la amikeco kaj kultura interŝanĝo inter la ĉina popolo kaj la popoloj de la koncernaj landoj.

### LA RUMANA POPOLA ENSEMBLO MURESUL

De la fino de majo ĝis la komenco de junio, la Popola Ensemblo Muresul veninta de la baseno de Mures-rivero de Rumanio faris prezentadon sur ĉinaj scenejoj. Kiam leviĝis la kurteno, viglaj dancmovoj kaj entuziasmaj popolaj arioj kun forta loka etoso karesis la spektantojn kiel frusomera zefiro. La prezentado kun la danco "Epopeo de Sendependeco" je la komenco kaj la kantodanco "Popolo, N. Ceausescu, Rumanio" je la fino brilis per la spirito de senĉesa batalado de la rumana popolo por nacia sendependeco.

La nomita ensemblo estas formita el eminentaj artaj amatoroj en la regiono de Mures kaj Tarnava. Ĝiaj membroj vivis kune kun popolaj artistoj en vilaĝoj kaj prilaboris riĉajn popolajn kantojn kaj dancojn por ilin provludi kaj prezenti.

La 50 rumanaj artistoj prezentis al ĉinaj spektantoj pli ol 20 popolajn kantojn kaj dancojn kun klara nacia stilo kaj intensa vivetoso.



*La rumana Popola Ensemblo Muresul*



*La japana Sinseisakuza Teatro*

La kantoj "Nia Lando Similas al Floro", "Bravuloj Transnaĝas Danubon" kaj "Danco de Barelistoj" prikantas la batalon de la rumana popolo unuiĝinta ĉirkaŭ la Rumana Kompartio estrata de Kamarado N. Ceausescu por konstrui novan vivon kaj prezentis la laboremon, inklinon, humoron kaj vivon de la rumana popolo.

Por esprimi sian amikecon al la ĉina popolo, la rumanaj artistoj kantis ankaŭ la ĉinajn kantojn "Sur la Ora Monto de Pekino" kaj "Sur la Akv' de Honghu, Ondon Pelas Ondo".

## GASTLUDO DE SINSEISAKUZA TEATRO EL JAPANIO

Ĉinaj spektantoj refoje intervidiĝis kun japanaj amikoj de la Sinseisakuza Teatro, kiu faris viziton kaj prezentadon en nia lando.

En novembro de 1975, ĝia estrino Miho Majama jam vizitis nian landon kun 20 junaj aktoroj sub sia gvido kaj starigis profundan amikecon kun la ĉina popolo. Ĉifoje 60 aktoroj de tiu teatro venis al nia lando por fari oficialan viziton kaj prezentadon.

La nomita teatro fondiĝis en 1950. Sub la devizo "iri en la amasojn kaj vivi inter ili", kun granda entuziasmo ĝi iris tra japanaj urboj, vilaĝoj kaj industriaj regionoj, persistante en prezentado por la amasoj kaj kreis multajn teatraĵojn spegulantajn la batalon kaj vivon de la laboranta popolo. La japanaj artistoj prezentis la dancojn "Transplantado de Rizidoj", "Preparado de Sakeo" kaj "Sansa-danco — Riĉa Rikolto" kaj popoldancojn spegulantajn la lokajn kolorojn kaj morojn "Aŭa-danco" kaj "Edo Macuri", en kiuj enkorpiĝis la laboremo, kuraĝeco, optimismo kaj viv-amo de la laborantaj

*La jugoslava Abrasevic-a Ensemblo de Popolaj Kantoj kaj Dancoj*





*Kvinteto de la Kanada Latuninstrumenta Bando*

popolamasoj. La aktoroj kantis japanajn popolkantojn kaj modernajn kantojn pri la batala vivo de la japanaj junuloj. La kantserio "Sakuro — Lasu Min Preterpasi", "Redonu Nian Nordan Teritorion" kaj "Retotira Kanto" prezentita kun gestado estis aparte kortuŝa.

La teatro faris prezentadon en Pekino, Hi-an, Jan-an, Nankino kaj Ŝanhajo kaj estis varme akceptita de la amasoj.

## POPOLAJ KANTOJ KAJ DANCOJ DE JUGOSLAVIO

En frua somero, la ĉina popolo akceptis amikajn artistojn de la Abrasevic-a Ensemblo de Popolaj Kantoj kaj Dancoj el Jugoslavio. Tiu ensemblo fondiĝis en 1905 kaj estas unu el la plej fruaj laboristaj amatoraj ensembloj. Ĝi prezentas kantojn kaj dancojn de diversaj naciecoj de la tuta Jugoslavio, ricevas ĝeneralan aplaŭdon de la jugoslavaj spektantoj kaj estis oficiale laŭdita de J. B. Tito, prezidanto de la Socialisma Federacia Respubliko Jugoslavio.


Tiu ensemblo ricevis la nomon de la poeto K. Abrasevic. En kolektado kaj prilaborado de popolaj dancoj, ĝi agas laŭ la ideo de tiu poeto, kiu alvokis la popolon leviĝi kun armiloj por batali kontraŭ la agresantoj kaj subpremantoj. La dancoj "Ero" kaj "Insurekcio" prezentitaj de jugoslavaj artistoj por ĉinaj spektantoj spegulis la batalspiriton de la brava jugoslava popolo en sentima luktado kontraŭ fortaj agresantoj. La "Danco de Vojvodine", "Kroatia Danco", "Danco de Macedoniaj Virinoj" kaj "Paŝtista Danco" kun intensa vivetoso spegulas la optimismon de la diversnaciecaj jugoslavaj popoloj amantaj liberon kaj laboron.

La orkestro de la ensemblo ludis ankaŭ popolajn muzikaĵojn kun viglaj kaj gajaj taktoj. La tuta prezentado plenis je varma amikeco.

## LA KANADA LATUNINSTRUMENTA BANDO

Ĉinio kaj Kanado estas du amikaj landoj apud Pacifiko. La prezentado de la Kanada

*La Stuttgarda Ĉambra Orkestro el la Germana Federacia Respubliko*



Latuninstrumenta Bando (kvinteta) en Ĉinio alportis ĝojon al la ĉina popolo.

La nomita bando konsistis el Charles Daellenbach (tubjo), Frederic Mills (trumpeto), Graeme Page (franca korno), Ronald Romm (trumpeto) kaj Eugene Watts (trombono). Post sia fondiĝo, ĝi ofte iris al vilaĝoj kaj urbetoj de Kanado por prezentadi en lokoj sen bonaj kondiĉoj kaj estis bonvena por lokaj amasoj.

La kanadaj muzikistoj ludis en Ĉinio verkojn de modernaj kanadaj muzikistoj kaj tiujn de eŭropaj kaj amerikaj muzikistoj. Ilia ludado de klasikaj muzikaĵoj konservis la originan stilon kaj ili prezentis modernajn kanadajn muzikaĵojn kun intensa loka koloro. La stilo de ilia ludado estas serioza, la tembro bela, freŝe klara kaj la ludado harmonia. La spektantoj multe laŭdis ilin. La muzikistoj ankaŭ ludis rapide lernitajn ĉinajn muzikaĵojn kiel "Kanto de Liberiĝo" kaj "Marnavigo Dependas de Stiristo" por esprimi sian amikecon al la ĉina popolo.

## LA UNUAJ MUZIKISTOJ DE LA OKCIDENTA GERMANIO EN ĈINIO

Kortuŝa muziko de kordinstrumentoj vibradis en la vasta halo de la Nacia Kultura Palaco — la Stuttgard-a Ĉambra Orkestro el la Germana Federacia Respubliko kaj la Ĉina Centra Filharmonio okazigis amikan koncerton antaŭtagmeze de la 8-a de aprilo, 1977.

Sub direktado de S-ro Karl Munchinger, la iniciatinto kaj direktanto de la orkestro, la 17 ludantoj de violonoj, aldoj, violonĉeloj kaj kontrabasoj ludis dum ĉifoja vizito eŭropajn klasikajn verkojn el la periodo de la 17-a ĝis la komenco de la 19-a jarcento kaj donis neforgesblan impreson al la ĉinaj spektantoj. Ili faris zorgan rekreadon tiel pri polifonie riĉa verko de Bach kiel pri tem-muzikaĵo de Mozart, kaj per harmonia kaj unueca kunludo de diversaj kordinstrumentoj kun klare senteblaj diferencigoj en dinamiko kaj tembro konservis la fundamentan fizionomion de la klasikaj verkoj kaj montris vivplenecon kaj entuziasmon. Iliaj artisma traktado al iliaj naciaj klasikaĵoj kaj sufiĉe perfekta tekniko estas lernindaj por ĉinaj muzikistoj. Tiu ĉi orkestro estas la unua artista grupo de G.F.R. vizitinta Ĉinion.

## PIANA SOLO-KONCERTO DE KJELL BAEKKELOND

Kun amikeco de la norvega popolo al la ĉina popolo, la fame konata norvega pianisto Kjell Baekkelond veturis al Ĉinio por fari prezentadon. Kun rafinita arto S-ro K. Baekkelond majstre ludis por ĉinaj spektantoj verkojn de E. Grieg, reprezentanto de la norvega nacia muzik-skolo en la 19-a jarcento. La ludado de liaj verkoj la "Minora Balado" kun la norvega nacio kiel temo kaj la "Humuraĵo" dediĉita al la aŭtoro de la norvega nacia himno havigis al ni ŝancon por apreci liajn originalan harmonion kaj artan aranĝon karakterizitan per lirikismo kaj naciaj trajtoj. Dum sia ludado, S-ro Baekkelond kvazaŭ aperigis antaŭ la ĉinaj spektantoj belajn pejzaĝojn kaj simplajn ĝenrojn de Norvegio.

*La fame konata norvega pianisto Kjell Baekkelond*






# Ĝing-oj

de ZONG MIN

ĜING-NACIECO estas unu el la nacimalplimultoj kun relative malmultaj membroj de nia lando kaj ĝi ĉefe okupiĝas pri fiŝkaptado ĉe marbordo de nia lando. Laŭ statistiko de la jaro 1973, troviĝas pli ol 4,600 ĝingoj. Granda parto de ili loĝas sur tri insuletoj Vanvej, Vutoŭ kaj Ŝanhin de la Donghing-a Diversnacieca Aŭtonoma Gubernio de Guanghi, kaj la ceteraj mikse loĝas kun hanoj en Giangping kaj aliaj komunumoj de la gubernio.


La lokoj loĝataj de ĝingoj antaŭe estis tri insuletoj proksimaj al la kontinento. Post la Liberiĝo, la ĝinga popolo ĉirkaŭbaris maron per digoj por konstrui kampojn kaj turnis la tri insuletojn en duoninsulon ligante ilin kun la kontinento. La klimato sur ĝi estas milda kun abunda pluvo kaj ĝiaj produktaĵoj estas riĉaj. La golfo Bak Bo sude de ĝi estas unu el la famaj fiŝkaptejoj de nia lando.

De la 15-a jarcento, la ĝinga popolo jam sin okupis pri produkta laboro en Vanvej, Vutoŭ, Ŝanhin kaj aliaj lokoj. La ĝingoj havas sian propran lingvon. Pro longa interrilatiĝo kun hanoj la plejparto de ili scipovas la hanan lingvon.

Antaŭ la Liberiĝo, la ĝingoj sin okupis ĉefe pri fiŝkaptado en malprofunda maro kaj prenis agrikulturan produktadon, preparadon de salo ktp. kiel flankokupojn. Tiam tie la klasa kontraŭdiro estis tre evidenta. Ni prenu Ŝanhin-insulon kiel ekzemplon, la insuleto sume havis 186 familiojn, inter kiuj 178 estis familioj de malriĉaj fiŝistoj kaj kamparanoj, mezkamparanoj kaj aliaj fiŝistoj, kaj nur 8 familioj de bienuloj kaj kulakoj, sed la lastaj posedis la plejparton de la produktaj rimedoj por fiŝkapto, agrikulturo kaj salprodukto kaj kruele ekspluatis la antaŭajn per ludonado de fiŝkaptiloj, fiŝregionoj kaj agroj. Ilia ekspluata kvanto ĝenerale superis 70 pocentojn de la rikoltaĵoj de la malriĉuloj.

En la historio la laborema kaj kuraĝa ĝinga popolo plurfoje batalis kune kun hanoj kaj jaŭoj kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. Dum la periodo de la Ĉina-Franca Milito (1884-1885), t.e. agresa milito fare de la franca imperiismo kontraŭ Ĉinio, la ĝinga popolo aktive helpis lokan armitan trupon la "Nigraflagan Armeon" en rezistado kontraŭ la invadantoj kaj samtempe kune kun hanoj organizis sin en "Giangping-an Kontraŭmalamikan Volontularon" kaj kuraĝe batis la agresantojn. Dum la reakcia regado de Kuomintango, la ĝinga popolo suferis kruelajn naciajn subpremadon kaj diskriminacion. La reganta klaso devigis ilin pagi "imposton por fiŝado kaj salo", "kapoimposton" kaj aliajn impostojn, kaj perforte soldatigis ĝingajn servaĝajn virojn, kio alportis al la ĝinga popolo

*Lernantoj en klasĉambro*



gigantan suferon. Por oponi kontraŭ la kruela subpremado de la reakciuloj, la ĝinga popolo multfoje leviĝis kontraŭ ili. En la periodo de enlanda revolucia milito kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo de nia lando de 1924 ĝis 1927, en la ĝinga regiono fondiĝis la ĝenerala laborista sindikato kaj kamparana ligo, kiuj elmetis la sloganojn "For imperiismon", "For feŭdajn militaristojn" kaj "For la koruptitajn oficistojn" kaj multfoje faris manifestaciojn. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la ĝinga popolo aktive aliĝis al kontraŭjapanaj gerilaj taĉmentoj gvidataj de la Komunista Partio de Ĉinio, senĉese surprizatakis japanajn agresantojn kaj persiste batalis ĝis la fina venko de la milito. En la Liberiga Milito, la ĝinga popolo energie subtenis al kaj partoprenis en la gerila milito gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio ĉe la limregiono de Guanghi kaj Guangdong kaj faris sian kontribuon por la liberiga afero de la popola revolucio.

En 1949, la ĝingaj tri insuletoj liberiĝis. Dum la periodo 1952-1954, la ĝinga popolo venke faris agraran reformon kaj demokratian reformon de fiŝkaptado, kaj ĝisfunde abolis la feŭdan ekspluatan sistemon. En 1955, la ĝinga popolo plenumis socialisman reformon kaj efektivigis kombinon de fiŝkaptado kaj agrikulturo, pro kio la fiŝkapta produktado disvolviĝis paŝon post paŝo de malprofunda maro al la profunda kaj la fiŝkapta kvanto senĉese plimultiĝas. En 1971, kvankam la fiŝkaptaj taĉmentoj senĉese suferis atakon de tajfunoj, sed la kvanto de la fiŝoj kaptitaj de ili ankoraŭ pligrandiĝis 1.1-oble kaj pli ol 4-oble respektive kompare kun tiu de 1965 antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj tiu de la komenca periodo de la Liberiĝo. Post la



*Ĝing-aj traktoristoj de Vanvej-brigado*

Liberiĝo, la ĝinga popolo ankaŭ disvolvis bredadon de perlokonkoj kaj konstruis bredejojn de perlokonkoj de naturaj kaj artaj perloj.

La ĝingaj tri insuletoj estas aluviaj insuletoj. Ili abundas je movebla sablo, ne povas elteni sekecon kaj sterilas. Pro tio ili estas malriĉaj insuletoj kun ne sufiĉaj kampoj, akvo kaj greno. Por ŝanĝi la malfavoran kondiĉon, la laborema kaj kuraĝa ĝinga popolo arde disvolvis la amasan movadon de lerno de Daĝaj en agrikulturo kaj ĉirkaŭ la insuletoj konstruis ĉ. 700 hektarojn da kampoj, 11 mardigojn kaj akvedukton kun longeco de 1850 metroj, per kiu akvo de la kontinento estas kondukita al la insuletoj. De 1971, la ĝinga regiono havas superfluan grenon kaj vendas ĉiujare kvanton da greno al la ŝtato. En la pasintaj kelkcent jaroj la ĝinga regiono devis vendi siajn fiŝojn kaj aĉeti rizon, sed nun ĝi jam ĝuas riĉajn rikoltojn de fiŝoj kaj grenoj.

Post la Liberiĝo, en la lumo de la nacia politiko de Prezidanto Maŭ pri aŭtonomeco de nacimalplimultaj regionoj, la ĝinga popolo efektivigis sian naciecan aŭtonomecon kaj elkulturis siajn kadrojn grandnombre. Ni prenu ĝingajn virinojn kiel ekzemplon, el la 2,254 ĝingaj virinoj 59 fariĝis gvidantoj de la niveloj de gubernio, komunumo kaj produkta brigado, du el ili estas elektitaj kiel membroj de la revolucia komitato de la Guanghia Ĝŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono, kaj 15 junulinoj fariĝis la unuaj kuracistinoj de la ĝinga popolo. En 1958 fondiĝis la Donghing-a Diversnacieca Aŭtonoma Gubernio. La popolanoj de la nacimalplimultoj inkluzive de la ĝingoj fariĝis mastroj de la ŝtato kaj la nacieca egalrajteco estas pluapaŝe garantiata. En la lastaj jaroj, la vivo de la ĝinga popolo ĉiam pli

boniĝis. La fiŝŝipoj havas sian sanitariston, ĉiuj produktaj taĉmentoj havas siajn kuracejon kaj "nudpiedajn kuracistojn". En la pasinteco, tie malmultaj el la ĝingoj scipovis legi kaj troviĝis neniu lernejo. Nun la gefiloj de ĝingoj ĝenerale vizitas mezgradan lernejon kaj elementan lernejon kaj iuj eĉ altan lernejon en aliaj lokoj.

La ĝingoj lertas en kantado kaj dancado. La unukorda muzikilo estas speciala nacia instrumento de la ĝingoj. Ĝi estas farita el duono de dika bambutubo kaj surhavas nur unu kordon. Pluke ludate ĝi povas produkti belajn sonojn. La kostumo de ĝingoj estas malluksaj kaj elegantaj. La virinoj kutimas porti striktan jakon kun mallarĝaj manikoj kaj longan kaj larĝan pantalonon, kaj kiam ili faras viziton, ili ŝatas porti helkoloran mantelon kaj orelringojn. La viroj kutime portas ĝisgenue longan superveston kun mallarĝaj manikoj kaj zono ĉirkaŭ la talio.

Antaŭ la Liberiĝo, sur la insuletoj estis tre malmultaj arboj kaj ofte blovis tajfunoj kiuj serioze damaĝis la agrikulturajn plantojn kaj la vivon kaj posedajojn de la popolo. Post la Liberiĝo, la ĝingoj energie disvolvis amasan movadon de kulturado de arboj kaj verdigo de la insuloj. Nun tie ĉirkaŭ vilaĝoj, ambaŭflanke de vojoj kaj apud granda digo ĉe marbordo estas protektaj forstozonoj kun altaj grandaj arboj, kiuj baras sabloventegon kaj tenas akvon kaj grundon. Ĉirkaŭ loĝdomoj kaj inter la forstozonoj oni plantis multajn fruktarbojn de banano, kokoso, mango, kaj papajojn, panarbojn ktp., kiuj ĉiam kreskas prospere kaj estas fruktoplenaj

HISTORIAJ OBJEKTOJ


# La Revolucia Movado de la Tajping-a Ĉiela Regno

de **ŜI GIN**

ANTAŬ pli ol 120 jaroj eksplodis en Ĉinio grandioza kamparana revolucio, nome la Revolucia Movado de la Tajping-a Ĉiela Regno. Ĝi estis grandskala revolucia batalo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo en la ĉina moderna historio.

La malvenko de la Opia Milito puŝis la ĉinan popolon en suferan abismon de duobla sklavigado de imperiismo kaj feŭdismo. Por pagi militajn kostojn kaj kompensojn, la reakcia kaj putra registaro de King-dinastio aldonis multajn novajn impostojn al la pezaj malnovaj impostoj kaj pliintensigis sian prirabadon al la popolo. Ne povante akiri vivrimedon, la vastaj amasoj de laboruloj estis devigitaj suriri la vojon de rezoluta kontraŭstaro. De 1841 ĝis 1850 kamparanaj bataloj

*Lanco de Tajping-armeo*




*Dekreto publikigita de Hong Hiukjuan al provinco Fuŝeng (la nunaj Suĝoŭ kaj Ĉangŝu) por redukti la impostojn de la tieaj popolanoj*


天王詔旨

kontraŭ la registaro leviĝis senĉese unu post alia tra la tuta lando kaj pli ol cent el ili estis relative grandskalaj. Fine formiĝis el ili potenca revolucia torento, nome la Revolucia Movado de la Tajping-a Ĉiela Regno de 1851 gvidata de Hong Hiukjuan.

Hong Hiukjuan (1814-1864 p. K.) estis eminenta gvidanto de la revolucio de la Tajping-a Ĉiela Regno. Li naskiĝis en kamparana familio de Huahian-gubernio de Guangdong-provinco. En sia 7-a jaro li komencis viziti lernejon, sed devis ĉesigi tion kiam li estis 16-jara pro malriĉeco kaj komencis terkulturi kune kun sia patro. Kiam li estis 18-jara, li fariĝis instruisto en privata lernejo. La hejmloko de Hong Hiukjuan troviĝis en regiono, kie klasaj kaj naciaj kontraŭdiroj estis tre akraj. La agresado de imperiismo, la putreco de King-dinastio, la mizera vivo de la kamparanoj, la tajdo de ilia indigna kontraŭstaro kaj la influo de la demokratia revolucia penso de la okcidenta burĝaro irigis Hong Hiukjuan sur la revolucian vojon. En 1843, li fondis sekretan organizon Diokultan Societon, al kiu aliĝis lia kunlerninto Feng Junŝan kaj lia kuzo Hong Ĵengan kiel la unuaj membroj.

La revolucia aktivado de Hong Hiukjuan estis persekutata de feŭdaj fortoj tuj je la komenco. En 1844, li kaj Feng Junŝan forlasis sian hejmlokon kaj iris al Guanghi-provinco. Tie li profundiĝis inter malriĉajn kamparanojn por propagandi la revolucion kaj mobilizi la amasojn. Baldaŭ poste, Hong Hiukjuan revenis al Huahian-gubernio kaj verkis "Kanton pri Mondsavo per Juandaŭ" k. a., en kiuj li elmetis sian politikan opinion pri opono kontraŭ subpremado, pledo por egalrajteco en politiko, ekonomio, nacieco kaj inter la viroj kaj virinoj kaj alvokis la popolon batali por



*Forta pafado de Tajping-armeo al la mararmeo de King-dinastio por defendi Tianging*

realigi la idealan socion de tutmonda familio kaj paco. Li nomis feŭdan imperiestron "infera diablo" kaj feŭdajn ŝtatoficistojn kaj bienulojn "diablaj oficistoj" kaj "diablaj soldatoj", kaj alvokis la popolon unuiĝi por ekstermi tiujn diablojn.

Servante kiel dungito en Ziging-montregiono de Gujping-gubernio de Guanghi, Feng Junŝan propagandadis pri la revolucio. En tiu regiono kun krutaj montoj, loĝis multaj malriĉaj kamparanoj sin vivtenantaj per terkulturo kaj preparado de lignokarbo kaj ministoj. Dank' al penlaborado de Feng Junŝan dum pli ol du jaroj, la Diokulta Societo ricevis pli ol 3,000 membrojn. En 1847 Hong Hiukjuan venis de Guangdong al Ziging-montregiono, pliapaŝe organizis la amasojn per sia revolucia teorio, kaj la membraro de tiu societo atingis 10,000 personojn. En 1849 natura katastrofo okazis en Guanghi kaj pli kaj pli ardiĝis la batalo de la kamparanoj kontraŭ la feŭda bienularo. Vidante ke maturiĝis la kondiĉoj por revolucio, Hong Hiukjuan faris ordonon de ĝenerala mobilizo en julio de 1850, en kiu li alvokis la membrojn de la Diokulta Societo kolektiĝi en Gintian-vilaĝo de Gujping-gubernio por ekzercado kaj farado de armiloj. En la 11-a de januaro, 1851 Hong Hiukjuan kun pli ol 10,000 homoj sub sia gvido, deklaris insurekcion kaj proklamis la fondon de la Tajping-a Ĉiela Regno.

Ne longe post la leviĝo, Hong Hiukjuan estis elektita kiel ĉiela reĝo. Kun la Tajping-a armeo sub sia gvido, li gajnis sinsekve venkojn super la armeo de King-dinastio. En 1852, la Tajping-a armeo marŝis el Guanghi, penetris en Hunan kaj poste puŝiĝis al Hubej. Survoje ili publikigis dekretojn kontraŭ King-dinastio, mortigis kaj forpelis feŭdajn ŝtatajn oficistojn kaj lokajn tiranojn kaj bruligis ter-aktojn kaj ŝuldatestojn. La kamparanoj de ĉiuj lokoj varme bonvenigis la Tajping-an armeon kaj aliĝis al ĝi. En januaro de 1853, la Tajping-a armeo konkeris gravan urbon Vuĉang en la meza baseno de Jangzi-rivero. La nombro de la armeanoj kreskis ĝis 500,000. Tuj

poste ĝi marŝis orienten laŭ la rivero surtere kaj surakve. En la meza tagdeko de marto, la armeo konkeris la plej grandan urbon de suda Ĉinio Nankinon kaj prenis ĝin por ĉefurbo alinomante ĝin Tianging, kaj oficiale fondiĝis kamparana revolucia regpotenco antagonisma al tiu de King-dinastio.

Por detrui la neston de King-dinastio en la nordo kaj sekurigi Tianging, en majo de 1853 Hong Hiukjuan ekspedis unu post la alia korpusojn norden kaj okcidenten. La norda ekspedicio malvenkis pro profunda enpenetro senhelpa, dum la okcidenta ekspedicio gajnis grandan venkon. En somero de 1856 la Tajping-a armeo frakasis la King-armeajn korpusojn sude kaj norde de Jangzi-rivero proksime de Tianging kaj prenis la vastan regionon de la meza kaj malsupra basenoj de Jangzi-rivero sub sian regadon. Kaj tiam estis la plej prospera periodo de militaj fortoj de la Tajping-a Ĉiela Regno.

Post la starigo de la ĉefurbo Tianging, la Tajping-a Ĉiela Regno faris aktivan konstruadon de regpotenco kaj publikigis la Agraran Sistemon de la Ĉiela Regno, kiu estas kontraŭfeŭdisma kamparana revolucia programo kun la agrara problemo kiel la centro, inkluzivanta la sferojn de politiko, ekonomio kaj socia vivo. Ĝi kondiĉis, ke "la tero de la lando estu kulturata de ĉiuj landanoj" kaj la kampoj devas esti dividitaj jene: la bonaj kaj malbonaj kampoj estas ordigitaj en naŭ klasoj, ĉiu viro aŭ virino de aĝo super 15 jaroj povas ricevi porcion da tero kaj tiuj kun aĝo de malpli ol 16 jaroj ricevas duonan porcion; ĉiu porcio egale konsistas el bona kaj malbona tero; la superbezona greno rikoltita de ĉiu familio devas esti liverata al la ŝtata tenejo por unueca uzo. Tiu sistemo de la Tajping-a Ĉiela Regno celis fondi ideallan socion, "en kiu la membroj kune terkulturas komunan teron, konsumas komunan manĝon, portas komunajn vestojn kaj uzas komunan monon kaj nenie troviĝas malegaleco kaj neniu suferas de malsato kaj frosto". Ĝi spegulas la fortan volon de la vasta kamparanaro aboli la feŭdan terposedan sistemon kaj estas brila literaturo en la historio de la ĉinaj kamparanaj militoj. Sed tia distribua sistemo de absoluta egaleco estis nur revo kaj neniam povas efektiviĝi. Ĉar en la limoj de la Tajping-a Ĉiela Regno, feŭdaj ŝtatoficistoj kaj bienuloj estis subpremitaj, nemalmultaj bienuloj forfuĝis, iuj kamparanoj ricevis teron kaj pli multaj kamparanoj pagis neniom aŭ nur malmulte da rento, kaj krome la revolucia regpotenco alvokis la kamparanojn "rapide komenci terkulturon" kaj kuraĝigis bredadon de silkraŭpoj, tial la kamparanoj akiris riĉan rikolton de greno, kaj prosperis komerco.

La Tajping-a Ĉiela Regno ankaŭ starigis la politikon de egalrajtoj de la viroj kaj virinoj kaj altigis la pozicion de la virinoj. Koncerne al internaciaj rilatoj, la Tajping-a Ĉiela Regno pledis por amika kontaktiĝo kun la fremdaj landoj kaj oponis kontraŭ neegalrajtaj kontraktoj kaj fremdlandaj agresoj.

La vigla disvolviĝo de la Revolucia Movado de la Tajping-a Ĉiela Regno teruris la malamikon. Por estingi la revolucian fajregon, la reakcia registaro de King-dinastio unuflanke faris arman subpremadon en koluzio kun fremdlandaj agresantoj, aliflanke ĝi sendis spionojn en la ĉefurbon Tianging por semi malpacon inter la trupoj de la Tajping-a armeo kaj logi ilin al kapitulaco. En tiu tempo, Vej Ĉanghuj kaj Ŝi Dakaj, membroj de malamika klaso, kiuj enŝteliĝis en la gvidantan kernon de la Tajping-a Ĉiela Regno, atendis ŝancon por uzurpi la plej altan gvidantecon de la revolucio. En aŭtuno de 1856, kun preteksto Vej Ĉanghuj murdis Jang Hiuking, unu el la gvidantoj de la Tajping-a armeo, kaj liajn pli ol 20,000 subulojn per surprizatako, kaj tuj poste sieĝis la loĝejon de Hong Hiukjuan kun la intenco lin mortigi. Sub la gvido de Hong Hiukjuan, la Tajping-a armeo ekzekutis Vej Ĉanghuj kaj estingis la ribelon. En junio de la sekvanta jaro, Ŝi Dakaj intencis monopoligi la regpotencon tamen ne sukcesis kaj poste per trompo li forkondukis pli ol cent mil oficirojn kaj soldatojn de la Tajping-a armeo el la ĉefurbo. La ribelo de Vej Ĉanghuj kaj la splita aktivado de Ŝi Dakaj multe malgrandigis la forton de la Tajping-a Ĉiela Regno kaj devigis ĝin sin turni de strategia ofensivo al strategia defensivo.

Vizaĝe al la malfacila situacio kaŭzita de la malamikoj interne de la revoluciaj vicoj, Hong Hiukjuan tamen estis neniom timigita. Decideme li promociis Ĉen Juĉeng kaj aliajn junajn oficirojn al komandantoj de la trupoj kaj instalis novajn asistantojn por administrado de la ŝtato. Energie li batalis kun la armeo kaj popolo sub sia gvido kaj frakasis la arogantan ambicion de la malamiko rapide kapti Tianging kaj estingi la revolucion. La Tajping-a armeo refoje frakasis la restarigitajn korpusojn de King-dinastio sude kaj norde de Jangzi-rivero, konkeris multajn urbojn kaj urbetojn, malfermis bazlokon de Giangsu kaj Ĝegiang kaj tiamaniere rebonigis la situacion.

Sed tiam la en- kaj ekster-landaj reakciuloj pliintensigis sian koluzion. Eksterlandaj agresantoj ne nur armis la armeon de King-dinastio per granda nombro da modernaj pafiloj kaj kanonoj, sed

ankaŭ formis kune kun ĝi taĉmenton kun modernaj pafiloj por kune ataki la Tajping-an armeon. Ekde la jaro 1862, fremdlandaj agresantoj kaj la armeo de King-dinastio atakis la Tajping-an armeon en tri vojoj. La generaloj kaj soldatoj de la lasta brave batalis en sango, plurfoje disbatis King-dinastiajn trupojn kaj mortigis la ĉefon de la taĉmento kun modernaj pafiloj usonanon F. T. Ward kaj multajn fremdlandajn agresantojn. Sed pro tromalgrandeco de siaj fortoj, la Tajping-a Armeo perdis la urbojn unu post alia Ningbo, Ŝaŭhing, Hangĝoŭ, Suĝoŭ kaj Ĉangĝoŭ. Kaj la longe sieĝata Tianging estis konkerita de la King-dinastia armeo en julio de 1864 pro elĉerpiĝo de manĝaĵo kaj manko de helpaj trupoj. La defendantoj de tiu urbo faris mortan batalon kontraŭ la malamikoj, sed nur parto de ili sukcesis eskapi dum la plejparto heroe oferis sian vivon.

La Revolucia Movado de la Tajping-a Ĉiela Regno, kiu daŭris 14 jarojn kaj disvolviĝis tra 18 provincoj, estis strangolita de en- kaj ekster-landaj reakciuloj en kunagado. La malvenko de la revolucia movado montris, ke en la duonkolonia kaj duonfeŭda Ĉinio, nur kamparana revolucia batalo sen gvido de la avangarda proletaro ne povas akiri venkon de la batalo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo.

Kvankam malvenkis la granda Revolucia Movado de la Tajping-a Ĉiela Regno, sed ĝi peze batis la feŭdan regantaron enlandan kaj la eksterlandan agresan forton kaj manifestis la obstinan kontraŭstaran spiriton de la ĉina popolo nevolanta submetiĝi al imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Ĝiaj brila faro kaj batala spirito ĉiam stimuladis la ĉinan popolon en la revolucia batalo ĝis la granda venko de la demokratia revolucio.

Teatraĵoj kaj Filmoj

# Pri la moderna dramo "LA LONGA MARŜO"

de BIAN GIĜI

La nomita dramo priskribas, kiel bataliono "Tajŝan" de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo faras la Longan Marŝon sekvante Prezidanton Maŭ. Ĝi prezentas la malfacilan historion de la Longa Marŝo de 25,000 Lioj antaŭ pli ol 40 jaroj.


En la komenco la dramo prezentas la krizan momenton de la ĉina revolucio. Tiam la enpartia oportunisto Vang Ming ĉiamaniere forpuŝis la gvidadon de Kamarado Maŭ Zedong al la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ruĝa Armeo kaj antaŭenpuŝis "maldekstran" oportunisman linion, tiel ke la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo kaj la revolucia bazloko fonditaj de Kamarado Maŭ Zedong falis en senelirejon kaj la Ruĝa Armeo devis fari la Longan Marŝon por translokiĝi.

La kurteno malrapide leviĝas kaj antaŭ la spektantoj prezentiĝas sceno de intensa batalo.

Estas aŭtuno de 1934. Ĉe la pramejo Vangniangtan de suda Ĉinio ardas batalo. Post batalado de kelkaj diurnoj kun la reakcia armeo de Kuomintango la bataliono "Tajŝan" perdis multajn homojn, ĝia estro oferis sian vivon, kaj el iu kompanio de ĝi restas nur iom pli ol 30 homoj. Vicbatalionestro Luo Ŝunĉeng indigne demandas: "Per la samaj homoj kaj samaj pafiloj oni gajnis venkon hieraŭ, sed malvenkas hodiaŭ. Kial?!" La politika direktanto de la bataliono Li Joŭguo diras, ke la Ruĝa Armeo venkis, ĉar ĝi havis la gvidon de Prezidanto Maŭ kaj lian ĝustan linion, sed nun ĝi estas venkita, ĉar ĝi perdis la gvidon de Prezidanto Maŭ kaj plenumas eraran linion. Kiel la komandantoj kaj batalantoj de la Ruĝa Armeo sopiras al Prezidanto Maŭ, ke li savu la Ruĝan Armeon.

En januaro de 1935 la Ruĝa Armeo atingis Zunji de Gujĝoŭ-provinco sur la vojo de la Longa Marŝo.

Por ne ĝeni la loĝantojn, la batalantoj de la bataliono "Tajŝan"



*Antaŭ perforta transpaso de Dadu-rivero ĵuras la bataliono "Tajŝan".*

tranoktas sub la ĉielo ĉe Jingĉun-kiosko en antaŭurbo de Zunji. Sed ili neniel povas endormiĝi kaj silente kolektiĝas ĉirkaŭ Li Joŭguo. Tra la nokta vualo ili fikse rigardas la lampolumojn en Zunji, kie iras la plivastigita kunveno de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio. La komandantoj kaj batalantoj de la bataliono gardantaj la antaŭurbon de Zunji senpacience atendas informon pri la kunveno. Ili havas neretenéblan indignon kontraŭ la oportunisma linio de Vang Ming. Pri tio Li Joŭguo skribis leteron kaj persone portis ĝin al la Centra Komitato de la Partio.

Sciiĝinte ke la Ruĝa Armeo tranoktas sub la ĉielo por ne ĝeni la popolamasojn, ankaŭ la kamparanoj de la antaŭurbo ne povas endormiĝi. Ili, ĉu viroj aŭ virinoj, ĉu infanoj aŭ maljunuloj, alportas al la batalantoj dolĉan zingibran dekoktaĵon por varmigi la lastajn kaj danki ilin pro tio, ke ili batalas kontraŭ bienuloj kaj lokaj tiranoj por la bono de la popolo.

Li Joŭguo revenas. Li ĝoje diras al ĉiuj, ke fermiĝis la kunveno de la Centra Komitato de la Partio, kiu kritikis la eraran oportunisman linion de Vang Ming kaj starigis la gvidan pozicion de Prezidanto Maŭ en la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ruĝa Armeo. La armeanoj kaj popolanoj tuj ekbolas de ĝojo. "La Ruĝa Armeo saviĝis!" "La ĉina revolucio saviĝis!" Por elpeli la japanajn agresantojn, kiuj jam entrudiĝis en la nordorienton de Ĉinio, por savi la ĉinan nacion el pereo, la Centra Komitato de la Partio decidis daŭre marŝi norden, kuniĝi kun la Ruĝa Armeo en norda Ŝenhi, starigi tie revolucian bazlokon kaj disvastigi la revolucion al la tuta lando.

La Longa Marŝo estas grava evento en la historio de la ĉina revolucio. En marŝado la Ruĝa Armeo kun dekmiloj da membroj ne nur devis grimpi neĝkovritajn montojn, trapasi marĉejojn kaj venki nekalkuleblajn malfacilaĵojn, sed ankaŭ estis senĉese ĝenata de rekognoskaj kaj bombaj aviadiloj de la malamiko kaj persekutata de la malamikoj. Tamen la Ruĝa Armeo movis siajn piedojn kaj iris pli ol 20,000 liojn trapasinte 11 provincojn, kaj dissemis venkojn de la ĉina revolucio.

La aŭtoro priskribas en la dramo scenon de "manovrado por ekstermi malamikojn". La Ruĝa Armeo faras finton, prenante eksterrnon de vivaj fortoj de la malamiko kiel ĉefan taskon. Ĝi vivece spegulas la eminentan militan penson kaj komandan arton de Prezidanto Maŭ. Spektantoj vidas, ke la Ruĝa Armeo kvazaŭ drako en akvo ĉie tenas en

si iniciativon, kaj fine fiaskigis la sieĝan atakon fare de 400,000 reakciaj armeanoj de Kuomintango.

Post tio la Ruĝa Armeo eniras en Ji-nacian regionon de Ĉinio. Pro serioza antagonismo kaŭzita de la kruela subpremado de la hanaj reakciaj regantoj al la ji-oj, la ji-oj ne komprenas la nacian politikon de la Komunista Partio de Ĉinio kaj rigardas la lastan kiel fraton de la kuomintangaj reakciuloj kaj baras la Ruĝan Armeon per armitaj fortoj. Vicbatalionestro Luo Ŝunĉeng erare traktas la ji-ojn, kiuj perforte baras la vojon, kiel malamikojn kaj sendas kapti la suban ĉefon de ji-nacio kaj malarmis lin.

Li Joŭguo havas relative altan politikan nivelon. Li pacience propagandas al la suba ĉefo la politikojn de la Komunista Partio pri egaleco de nacioj kaj la celon de la Longa Marŝo. Li redonas al li la pafilon kaj glavon, donacas al li kuglojn kaj lasas lin reveni hejmen. El tiuj sinceraj agoj ji-oj konas, ke malsamaj estas la Ruĝa Armeo gvidata de la Komunista Partio kaj la reakcia armeo de Kuomintango, kaj la unua militas por la interesoj de la diversnaciaj popolanoj. Tial ili fervore helpas la Ruĝan Armeon trapasi la ji-nacian regionon. Kaj la Ruĝa Armeo venas al Dadu-rivero.

Muĝas la rivero kun ondegoj. Ambaŭborde staras krutaj rokmuroj kaj la kontraŭa bordo estas gardata de multaj malamikaj soldatoj. La soldatoj de la Ruĝa Armeo urĝe faras flosojn por transpasi la riveron. Persvadite de Li Joŭguo la veterana pramisto riparis la solan pramon kaj venigis lokajn ŝipistojn por transporti la personaron de la Ruĝa Armeo. Per la flosoj ĉiuj batalantoj de la Ruĝa Armeo transpasis la riveron, malgraŭ la kugla pluvo kaj grandegaj ondoj antaŭ ol alveno de helpa trupo de la malamiko. Poste la armeo atingis la piedon de la neĝkovritaj montoj.

Tiam sur la fono de la scenejo estas prezentataj nubego, furioza ciklono ĵetanta neĝbuletojn en la aeron. Sur tiu monto netransflugebla de birdoj la batalantoj de la Ruĝa Armeo paŝas per pezaj paŝoj, helpante unu alian. La vojo estas kovrita de neĝo kaj estas malfacile orientiĝi. Li Joŭguo elpoŝigas magnetan kompason por trovi la nordon kaj poste daŭre kondukas la batalionon. La granda neĝmonto fine estas konkerita kaj ili venas en la marĉejon.

Tie la vetero estas kaprica kaj abundas marĉoj, kiuj estas malfacile elireblaj kaj povas mortigi enfalintojn. Tiam la batalantoj de la Ruĝa Armeo tre laciĝis de longa irado kaj kruroj de iuj soldatoj dikiĝis pro ŝvelo. Graviĝas la vundo de Li Joŭguo. Neniom da greno estas trovebla por manĝi. Li Joŭguo kaj liaj kunbatalantoj devas sin satigi per kuiritaj ledaj zonoj kaj herboj. Kvankam la kondiĉoj estas tre malfacilaj, tamen la batalantoj havas altan batalvolon. Antaŭ sia martiriĝo subplotonestro Vang firme kredas, ke sub la gvido de Prezidanto Maŭ la revolucio

*Li Joŭguo donacas verkojn de Prezidanto Maŭ al Kian Juhiong, estro de la Ruĝa Gvardio.*



*En la plej malfacila tempo de trapasado de marĉoza herbejo, Li Joŭguo (dekstre) kuraĝigas la soldatojn, ke venki la malfacilojn signifas triumfon.*



certe sukcesos kaj la suferinta popolo de la tuta Ĉinio certe vivos feliĉe. Li Joŭguo sopiras al la bela estonteco de la granda stepo post sukceso de la revolucio kaj plenas de firma kredo je la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj naskiĝo de la nova Ĉinio.

Ĝuste tiam estro de la bataliono "Gingiang" de la Kvara-fronta Armeo de la Ruĝa Armeo Han Jong venas al Li Joŭguo por malkaŝi al li la intrigon de la gvidanto de la nomita trupo Ĝang Guotaŭ, kiu perdas fidon al la revolucio kaj kovas intrigon suden fuĝi por starigi alian centran komitaton kaj spliti la Partion kaj la Ruĝan Armeon. Li Joŭguo tuj sendas raporti tion al Prezidanto Maŭ. Kaj samtempe li kuraĝigas Han Jong klare orientiĝi, senŝanceliĝe stari kaj firme kredi, ke la komandantoj kaj batalantoj de la Kvara-fronta Armeo firme batalos kontraŭ la dekstra oportunisma linio de Ĝang Guotaŭ kaj konduki la revolucion ĝis la fino sekvante Prezidanton Maŭ.

Post penema batalado, la Ruĝa Unua-fronta Armeo fine atingis nordan Ŝenhi. Kuniĝinte kun tiea Ruĝa Armeo, ĝi gajnis ŝlosilan batalon, eksterminte unu ĉefan divizion kaj du regimentojn de la malamiko. Tiu venko pretigis favoran kondiĉon por kuniĝo de la Dua- kaj Kvara-frontaj Armeoj kaj estas ceremonio por meti angulŝtonon de la kontraŭjapana ĉefstabo en la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a bazloko.

En la fino la dramo montras la grandiozan scenon de la kuniĝo de la Unua-, Dua- kaj Kvara-frontaj Armeoj kun la Ruĝa Armeo en norda Ŝenhi ĉe la piedo de la Pagoda Monto de Jan-an en januaro de 1937. La batalantoj de la Ruĝa Armeo kaj lokaj loĝantoj kantas kaj dancas kun koloraj flagoj kaj floroj en la manoj. La kvar trupoj de la Ruĝa Armeo ekmarŝos de Jan-an al la fronto por batali kontraŭ la japanaj agresantoj.

La dramo montras, ke unuiĝo estas forto, estas venko. Kiel ajn zigzaga estas la vojo, la revolucio venkas se la Ruĝa Armeo plenumas la revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj unuiĝas, alie la revolucio malvenkas.


# Envaza Florarانĝo de Suĝoŭ

ENVAZA florarانĝo de Ĉinio havas longan historion. Antaŭ ĉirkaŭ 2,000 jaroj, ĉinaj laborantaj popolanoj jam komencis transplanti florojn en vazojn por dekoro. Pli poste, sekve de altiĝo de la kultiva tekniko kaj la nivelo de la kultura vivo, oni postulis krom natura beleco ankaŭ artisman aranĝon de la floroj en la vazoj, kaj tiel naskiĝis la arto de envaza florarانĝo. En Ĉinio troviĝas multaj lokoj, kie oni kutimas praktiki tiun arton, kaj inter ili la urboj Suĝoŭ, Ĉengdu, Kantono kaj Ŝanhajo estas famaj.

Suĝoŭ estas fama pitoreska urbo de nia lando kaj nun konserviĝas tie multaj historiaj vidindaĵoj. En la longa historio laborantaj popolanoj de tiu urbo kreis multajn ĝardenojn kun fositaj lagetoj, masonitaj montetoj, pavilonoj, kioskoj, belaj arboj kaj floroj. Kaj tie oni povas vidi multajn envazajn artismajn komponaĵojn. Iuj el tiaj komponaĵoj impresas per imponeco, originaleco, antikveco kaj forteco, aliaj per leĝereco kaj eleganteco, triaj per gracieco kaj svelteco. Multaj envazaj miniaturaj pejzaĝoj komponitaj el ulmoj, pinoj, bambuoj kaj ŝtonoj karakteriziĝas per maldikeco, spacokonveneco kaj gustoriĉeco je rigardo de malsamaj flankoj. Ĉar tiaj artaĵoj estas poeziaj, oni kutime lokas ilin sur skribotablo, fenestro aŭ en korto por dekori medion kaj plezurigi la okulojn.


Depost la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la ĝardenistoj de Suĝoŭ faris multajn novajn envazajn belaĵojn kun eleganta formo kaj originala stilo, kaj multe evoluigis tiun arton. Interne de la dorsa kovrilo de tiu ĉi numero ni prezentas al vi kelkajn florarانĝojn de Suĝoŭ.

# Envaza florarango de Suĝoŭ











12859

KUL

世界语《中国报道》一九七七年第八期（本刊代号：二——九一五）